

Volume 5


June, 1909

Number 5

# Amerika Esperantisto

A Monthly Magazine of the  
International Language

# ESPERANTO



American Esperantist Company  
235 Fortieth Street  
CHICAGO

Price, Ten Cents

Per Year, One Dollar

# AMERIKA ESPERANTISTO

WITH WHICH IS COMBINED

## THE AMERICAN ESPERANTO JOURNAL

Entered as Second-Class Matter October 1, 1907, at the Post Office at Chicago, Illinois, under Act of March 3rd, 1879


Direktoro **ARTHUR BAKER** Managing Editor

<b>TERMS OF SUBSCRIPTION</b> Per year in United States and Mexico, one dollar. In Canada, \$1.15. In other countries, \$1.25	<b>KONDIĈOJ DE LA ABONO</b> Jara Abono, spesmiloj 2.05 en Usono kaj Meksiko. En Kanado, Sm. 2.30. En aliaj landoj, Sm. 2.55
<b>ADVERTISING RATES</b> Our rates are lower, in proportion to circulation, than those of any other Esperanto publication. Send for schedule.	<b>PREZOJ DE REKLAMADO</b> Proporcie al la disvendado, niaj prezoj estas pli malkaraj ol tiuj de iu alia esperantista eldonaĵo. Petu tarifkarton.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY 235 Fortieth St. CHICAGO



## THE AMERICAN ESPERANTO BOOK



The Standard Compendium. First edition issued, July 1907  
*Thirty-Eighth Thousand*, January 1908.

### CONTENTS

**Pronunciation** : Clearly explained, with keys and exercises. No teacher needed.

**Grammar** : The original international rules, with translation; a careful analysis from the viewpoint of the person of moderate education.

**Exercises** : Forty-two standard international exercises, by Dr. Zamenhof, author of Esperanto. Each has vocabulary, notes and translation.

**Vocabularies** : Esperanto-English, complete, 76 pages; English-Esperanto, selected, 54 pages.

Total, 320 pages. Heavy English finish paper, specially milled for us. Extra green cloth binding, white stamped

### PRICES AND CLUBBING COMBINATIONS

Single copy, postpaid, \$1.00; with year subscription to magazine, \$1.50.  
Five copies, express paid, \$3.75. The combination in clubs of five or more, at \$1.20.

### SPECIAL PREMIUM EDITION

Same plates as cloth edition, narrow margins, thin bible paper, paper cover; weight, 4 oz.  
**FREE** with each subscription to *Amerika Esperantisto*. Five or more, at 75c.

**Clubs, Classes and Agents** who have made an initial wholesale order are allowed wholesale rates on subsequent orders, any quantity. **Dealers** receive wholesale rates for any purchase.

AMERICAN ESPERANTIST COMPANY CHICAGO  
Publishers and Importers 235 East Fortieth Street



**ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA  
(OFFICIAL PART)**

Offices, 3981 Langley Avenue, Chicago

Edwin C. Reed, Secretary

Benedict Papot, Chairman Publications Committee

**THE AMERICAN CONGRESS.**

Less than three months now remain before the gathering of the second Esperanto Congress of North America, and it behooves each of us to strain every nerve to make it a rousing success. We can announce that we have secured the attendance of Prof. E. Boirac, President of the University of Dijon, France, and also President of the Esperanto *Akademio*, so that we shall be able to have direct information at first hand of the work done by the *Lingva Komitato* and *Akademio*.

There are also strong probabilities that we shall have with us Col. John Pollen, President of the British Esperanto Association, who will be able to give us valuable information. The executive committee is in communication with several other *eminentuloj*, and hopes to be able to make further announcements next month. While all Esperantists cannot go to Barcelona, a great many can come to delightful Chautauqua and meet these gentlemen, who will make the trip expressly to meet them. It is the aim of the executive committee to provide all Esperantists with the opportunity to promote what is dearest to them, and we earnestly beg all persons interested in any sort of subject to take the initiative, and send to Prof. B. Papot, 298 S. Irving avenue, Chicago, calls for special meetings during the Congress week. Time and place will be provided for all such meetings for which a call has been received, between the general meetings during Congress week. For instance, this committee is in receipt of several letters in regard to religious services, translation of the Bible and missionary work, and therefore, Rev. Mr. Day, of Chautauqua, has been appointed to provide place for those meetings, and will communicate from now on with the persons interested.

Mr. Alfred Hallam will have charge of the Esperanto Concert at the Auditorium on Monday, August 9, and it is probable that it will be one of the best concerts of the season.

The executive committee of the Pittsburgh Esperanto Club will take charge of the dance at Lakewood on the evening of Thursday, August 12. The Chautauqua authorities will arrange for the excursion to Niagara Falls on Saturday morning.

The one weak point so far has been the question of Esperanto plays. Amateurs must come forward, and declare their willingness to take part, so that as soon as we know whom we may depend upon, a play may be finally selected and the parts cast.

We already have the assurance of a much larger attendance than last year. In fact, vague rumors of a special train from the far East have reached our ears. Hurrah, for the New England division! It is the oldest division, and it excels in concerted action. Let all take interest in this Congress, so that its actions may be duly representative of the will of the Esperantists, so that we may send official delegates to Barcelona, who will be instructed to speak in our names, delegates whom we shall back with our united support, and who will impress upon the Barcelona Congress the necessity of each that nation appoint official delegates endowed with the right to vote for all their fellow country men, and let us pave the way for a thoroughly representative Congress of Esperantists in the United States next year.

**NOMINATIONS.**

The attention of the members of the Esperanto Association of North America is called to Section 2, Article VII, of the Constitution. The section reads: "The general council shall be elected at the annual meeting of the association. Nominations signed by at least five members may be sent to the secretary at any time within three months prior thereto and shall be published by him in the official organ of the association in the issue immediately preceding the said meeting."

From the nature of the organization, the Councilors are the voices of their respective divisions, and it is to the Councilors that the officers and executive committee must turn to learn the wishes of the association. It is, therefore, of extreme importance that the members give careful consideration to the nominating and electing of men who will fitly represent them, choosing not only men of good judgment who represent the views of the division's members, but also men who have and will work to increase the strength of the association.

## MEMBERSHIP NOTICE.

All membership certificates issued after publication of this number until after the Chautauqua Congress will be dated to March 31, 1910. This will allow a vote in person, or by proxy, in the Second American Congress, and yet give the greater part of a year's membership.

## VOTING POWER OF COUNCILORS.

Up to May 2, and including the seventy-six new members listed in this number, the voting power of the Councilors is:

New England Division, Mr. J. F. Twombly	180
New York Division, Mr. Henry D. King..	115
Eastern Division, Mr. John M. Clifford, Jr.	103
Capitol Division, Mr. J. W. Cheney .....	032
Southern Division, Mr.....	037
Ohio Valley Division, Mr. H. M. Scott....	115
Central Division, Mr. Benedict Papot....	156
Prairie Division, Prof. Geo. H. Fracker....	102
Southwestern Division, Mr. E. C. Reed...	029
Western Division, Prof. J. M. Dixon.....	113
Canadian Division, Mr. R. M. Sangster...	018

1000

## CORRECTIONS.

The following additions and corrections in the "Adresaro" are hereby made: The following should be added, 2200 Patrick Kane, 419 Third avenue, Carnegie, Pa.; Rev. J. B. Spiers, appearing under Norfolk, Va., should be under Richmond, Va.; the following should be listed among those possessing the British diploma: Mrs. Mary R. Chipman, Philadelphia, and W. B. Sterrett, Sewickley, Pa.; Rev. H. C. Colburn, listed under Columbus, Ohio, should be 724 West Sixth street, Marion, Ind.; H. V. R. Schrader listed Dreamwood, S. C., should be Greenwood, S. C.

## PASSED ADVANCED EXAMINATION.

*Atesto pri Kapableco.*

Miss Mary L. Bibbey, Dorchester, Mass.  
W. L. Church, Boston, Mass.  
G. K. Edwards, Fort Omaha, Neb.  
C. H. Fessenden, Newton Center, Mass.  
James B. Hammond, Nairn Center, Ont.  
Miss Bertha E. Ware, Anaconda, Mon.

## PASSED PRELIMINARY EXAMINATION.

*Atesto pri Lernado.*

James Ellis Gow, Cedar Rapids, Iowa.  
Miss Minnie O. Hall, Anaconda, Mon.

## AN ENGLISH VISITOR.

Prof. A. Christen (F. B. E. A.), one of Great Britain's most energetic propagandists of the international language, is at present visiting the American *samideanoj*. He will be in Chicago about the middle of May to conduct a short course of lessons, and deliver a lecture on Esperanto. It is hoped that many other cities can use Prof. Christen to advantage, especially cities east of Chicago, as he would like engagements to fill his time until the

Congress. Prof. Christen may be addressed, while in Chicago, care of Prof. Benedict Papot, 298 S. Irving avenue, Chicago.

## NEBRASKA STATE MEETING

Official notice is hereby given to all Esperantists of the state of Nebraska that a meeting for the purpose of forming a federation or association for that state will be held in the public library of Omaha on Friday, the 11th of June, at 2:30 P. M. Each member of the Esperanto Association of North America residing in Nebraska is entitled, and strongly urged, to be present either in person or by proxy.

## PITTSBURGH ESPERANTO SOCIETY.

The first annual meeting of this Society was held on the 1st of April in Carnegie Institute. There was a large turnout of members and visitors. The reports submitted by the officers showed that the society had made good progress during the year. There are 183 members on the roll, most of whom are active students of the language. The teaching season for some of the classes is over and examinations will be held during April, with a view to advancing the proficient of the elementary grade.

The feature of the meeting was an address by Professor Clayton R. Bowen, of Meadville, Pa., on the subject: "Esperanto and Education." He took the high ground that Esperanto was not merely educative of the mind, but that its study and practice would inevitably be followed by the enlarging and broadening of the religious spirit, speaking of religion in its most catholic sense. Professor Bowen was followed by the Rev. John Kubacki, of Blossburg, Pa., an enthusiastic Esperantist, who delivered a short address of the most practical kind.

The election of officers for the ensuing year resulted as follows: President, Henry W. Fisher; vice president, James McKirdy; secretary-treasurer, Kenneth C. Kerr, and director of instruction, John M. Clifford, Jr. In the past year the society devoted most of its energies to the establishment and maintenance of classes, but the coming year its efforts will be extended, a lecture bureau being among its plans. It shall have in view the object of introducing Esperanto into some of the educational institutions of this state.

These matters will be in the hands of the executive committee which will be assisted by sub-committees on propaganda, membership and entertainment. The executive committee has been enlarged to seven members, instead of five, as it numbered last year, and consists of the president, vice president, secretary-treasurer and four others appointed by the president. The announcements of the appointments to this committee will be made later.

*New England Division.*—A meeting of the New England Esperanto Association was held in the lecture hall of the Boston Public Library Saturday evening, May 8th. Representatives were present from many sections of this Division and spoke enthusiastically of

work in their localities. Among these Prof. Vogel of "Tech" and Prof. Bell of Clark University. The principal address of the evening was in Esperanto by Dr. Lowell and was heartily received. An invitation accepted to hold the June meeting with the Manchester Institute of Arts and Sciences and the "Pionera Grupo" of Manchester. This meeting will be an important one as the hosts are preparing an attractive program. The date chosen is Saturday, June 12th. Full arrangements as to transportation, accommodations, et cetera, will have been perfected by the time the June ESPERANTISTO is issued, and particulars may be had from the Secretary of the Association.

HOME PROPAGANDA AND NOTES.

Esperanto was taught in the Pittsburgh High School last winter, according to the *Cornell Alumni News*, in a note referring to H. W. Fisher, M. E., '88, president of the Pittsburgh Esperanto Society.

At Abraham Lincoln Centre, Chicago, one of the largest and most widely known institutional churches in America, the subject of the sermon on April 25 was "Esperanto; a Quest for Universal Brotherhood." The minister of this church, Jenkin Lloyd Jones, is a leader

in the international peace movement and was honorary secretary and one of the organizers of the World Congress of Religions held in Chicago in 1893. Lincoln Centre is a type of the new church, called "institutional" for lack of a better word. In the six-story building besides weekly sermons there are given lectures, lessons in music, dancing and athletics; while a large library and reading-room tend to make the church a "center" of intellectual and social life for its adherents. This sort of unidentified socialism is even more fully expressed in a New York "institution," which adds a bank and pawn shop to its other activities.

The *Record* of Columbia, S. C., has a long propaganda article in a recent number.

And the medical men are most interested, after all, not in whether the word "bloody" is *sanga*, *sangosa* or *sangatra*, but in Esperanto as a means of immediate and practical use. The *American Journal of Clinical Medicine*, published at Ravenswood Station, Chicago, now has a regular department of Esperanto. The *Journal* has a circulation of about 50,000 monthly, contains over one hundred pages each issue and the price is \$2.00 per year. Medical Esperantists who are not already subscribers to the excellent publication are requested to order it through AMERIKA ESPERANTISTO.

LIST OF NEW MEMBERS FOR APRIL

NEW ENGLAND DIVISION.

Portland (Me.).

- Barrows, Mrs. C. O.
- Decelle, Miss Lena B.
- Ingalls, Miss Marion G.
- Robbins, Miss M. Alice.
- Tapley, Miss Fannie W.
- Wilson, Mrs. Susie E.

Connecticut.

John W. Nardini, New London.

NEW YORK DIVISION.

- Toisma, Miss Ellen, Buffalo.
- Trant, Dr. Amelia Earle, Buffalo.
- Rosenbluth, Miss Lillian, East View.
- Eckler, Arthur W., Ilion.

EASTERN DIVISION.

- Sussumuth, John J., Allentown, Pa.
- Kemble, Isaac, Mount Carmel, Pa.
- Chipman, Mrs. Mary R., Philadelphia, Pa.
- Dean, Miss Isabella M., Pittsburg, Pa.
- Galterio, Edward, Pittsburg, Pa.

CAPITOL DIVISION.

- Barford, Miss Jessie, Woodford, Tenn.
- Kapitola Klubo (Washington, D. C.)**
- Brewerton, Eugene.
- Carwile, Miss Lora.
- Collings, Mrs. Dora.
- Duffy, Miss Susie I.
- Germiller, J. Francis.

- Germiller, Miss T.
- Giffin, Miss Esther J.
- Giffin, Mrs. Ruth J.
- Grady, Miss Catherine.
- Gallihew, J. A.
- Hufty, French S.
- Miller, Miss Lurena J.
- Murry, Miss Alice.
- Patterson, Miss E. L.
- Rodiffer, Miss Ella F.
- Stone, Miss Harriet L.
- Tippett, Joseph S.

SOUTHERN DIVISION.

- Little, Miss Marie, Savannah, Ga.
- Jerauld, Miss Margaret, Mary Esther, Fla.
- Pryor, Miss Ida, Mary Esther, Fla.

South Carolina.

- Epting, Miss Ethel M., Greenwood.
- Epting, Mrs. Mary A., Greenwood.
- Dibble, Mrs. Mary E., Orangeburg.
- Jordan, E. M., Seneca.

Charleston.

- Andrews, Prof. J. J.
- Behlmer, H. C.
- Gray, Rev. Clifton M.
- Hunter, Dr. B. W.
- Jordan, L. M.
- King, R. H.
- Klatte, Dr. W. O.
- Knobeloch, Dr. L. E.
- Kraft, Rev. G. A.
- Mixson, L. H.

- Percy, Rev. C. L.
- Philon, George.
- Reeves, John B., Jr.
- Slattery, J. A.
- Speisegger, A. C., Jr.
- Steele, G. B.
- Stokes, Rev. Peter.
- Stuhr, J. Henry.
- Towles, Prof. E. S.
- Wedding, Robt. B.

OHIO VALLEY DIVISION.

James O. Butte, New Philadelphia, O.

CENTRAL DIVISION.

Chicago (Ill.).

- Cernicky, Jan.
- Condax, Basil A.
- Jirak, Karel.
- Kofranek, Mrs. Bojena.
- Kofranek, C. B.
- Seippel, Clara P., M. D.

Milwaukee (Wis.).

- Hustings, Miss Elizabeth.
- Schlueter, Mrs. E.
- Schlueter, Miss Elsa.
- Schlueter, Miss Emily.

PRAIRIE DIVISION.

Hurley, Stephen, Fairmount, N. D.

WESTERN DIVISION.

- Ware, Mrs. I. S., Bozeman, Mont.
- Mason, Rev. R. W., Alberton, Wash.

CANADIAN DIVISION.

Noddings, Mrs. C. W., File Hills, Sask.



## POR LA KOMENCANTO

### JAKO KAJ JILO.

La tutan tagon Jako kaj lia fratino Jilo ludis en la ĝardeno. Ili estis tre bonaj infanoj, kaj sin amuzis sen ludiloj. Ili faris koto-kukojn kaj pretendis ke ili estas bakistoj.

Sed post kelkaj horoj, la suno komencis subiri, kaj la gefratoj rememoris ke baldaŭ la patrino vokos ilin, kaj diros "La vesper-maĝo estas preta. Venu tuj!" Tial Jilo diris "Niaj manoj estas malpuraj: Ni certe devos lavi al ni la manojn antaŭ ol iri en la domon, ĉar alie la patrino riproĉos nin."

"Jes," respondis Jako, "sed ni havas neniom da akvo. Ĉu vi akompanos min al la fonto, por ĉerpi sitelon da akvo?"

"Certe mi iros kun vi," diris Jilo, afable, kaj ŝi tuj prenis la tenilon de la sitelo, por helpi sian fraton. (Bonŝance, ili havis la sitelon kun si.)

"Mi dankas vin, fratineto," diris Jako, "ĉar mi estas tre malsata, kaj se ni rapidos, ni baldaŭ havos la vesper-maĝon."

Tiam la du infanoj marŝis al la monteto sur kies supro troviĝas la akvofonto. Laŭ la vojo, ili rigardis la belajn florojn, blujajn, ruĝajn, kaj flavajn, kaj flaris la bonan odoron de la floroj. Ili ĝoje aŭdis la birdojn, kiuj kantis belsonajn kantojn, pri la malgrandaj birdidoj en la nestoj. Oni ne povis vidi la birdojn, pro la multaj verdaj folioj, sed oni povis vidi ke la branĉoj movis iom, kiam la birdoj ekflugis. Jako kaj Jilo estis tiel feliĉaj, kiel la birdoj, kaj tial la du infanoj ankaŭ kantis. Ili kantis en Esperanto, la belsona, fleksebla, facila lingvo kiun ili lernis ĉe la lernejo en sia vilaĝo.

Baldaŭ ili alvenis ĉe la supro de la monteto, kaj Jako plenigis la sitelon, ĝis la akvo venis al la rando de la sitelo.

"Nu," li diris, "la sitelo estas plena je akvo, kaj ni devos rapidi. La suno subiras pli kaj pli, kaj ne estos agrable se la patrino riproĉos nin."

"Se vi timas, do," mokis la fratino, "kial vi ne kuras malsupren al la hejmo? Mi mem ne timas la patrinan riproĉon. Mi estas kuraĝa!"

"Mi tute ne timas la patrinon," respondis Jako, kolere, "kaj ankaŭ mi ne timas kuri malsupre la monteton. Sed vi timas, ĉar vi estas nur knabino!"

"Ne, ne," tuj kriis Jilo, "mi estas knabino, sed mi ne timas kuri malsupren. Kaj mi povas kuri tiel rapide kiel vi. Tamen, vi devos porti la akvo-sitelon!"

"Bone!" kriis Jako, "Venu do!" Kaj li tre rapide kuris, portante la sitelon da akvo. Post li kuris lia fratino, ankaŭ tre rapide, sed ŝi ne povis pasi lin. Subite Jako falis sur ŝtono en la vojo, kaj falis malsupren, sur la tero. Li perdis la tenilon de la sitelo, kaj la akvo spruĉis sur lin, kaj malsekigis liajn vestojn. Precipe, lia kapo frapis kontraŭ la stono, tiom ke li pensis ke la kranio estis rompita. Li vidis dek mil stelojn, kvankam ankoraŭ ne estis la nokto.

Li komencis laŭte plori, sed ne ploris sole, ĉar tuj lia fratino Jilo falis sur li, kiam li falis.

"Ho ve!" ili kriis, kaj ploris tiel laŭte kaj tiel multe ke la larmoj komencis plenumi la akvo-sitelon. "Nun ni havas neniom da akvo, kaj ni ne povos lavi la manojn, kaj tiam la patrino riproĉos nin. Kaj ŝi ne permesos ke ni maĝu la vespermaĝon, kaj ni estas tre malsataj! Kaj la kontuzoj sur niaj kapoj tre dolorigas! Ho, niaj kompatindaj kapoj!"

Kaj malrapide ili stariĝis, ankaŭ plorante, kaj komencis marŝi malrapide al la hejmo. Ili ne kuris, sed nur marŝis malrapide, tenante la kapojn per la malpuraj manoj, pro la grandaj kontuzoj. Kiam ili alvenis ĉe la hejmo, la patrino diris:

"Ho, vi malbonaj infanoj! Viaj manoj estas tre malpuraj, kaj vi rompis la novan sitelon, kaj ŝiris viajn vestojn! Vi devos iri al lito tute sen la vespermaĝo! Tiamaniere mi punos miajn malbonajn infanojn!"

SIMON PURE.

# LITERATURO

SINJORINO McWILLIAMS KAJ LA  
FULMOTONDRO.

TRADUKIS  
WILLIAM GEORGE ADAMS

NOTO.—Kiam la tradukinto skribis al la mondfama aŭtoro, Sro. S. L. Clemens (plibone konata per la pseŭdonomo *Mark Twain*), petante permeson publikigi tiun ĉi tradukon, tiu respondis (angle): “Jes, vi havas mian permeson esperantigi ‘Sino. McWilliams kaj la Fulmotondro.’ Se mi estus kelkajn jarojn pli juna, mi lernus tiun ĉi lingvon. Iaokaze mi provus se mi estus certa ke ĝi estos parolata de la anĝeloj.”

Nu, sinjoro, daŭrigis Sinjoro McWilliams, ĉar tio ne estis la komenco de lia parolado—la timo al la fulmo estas unu el la plej malfeliĉaj malfortecoj per kiuj homoj iam estas turmentataj. Ĝi estas plej ofta ĉe la virinoj; sed kelkfoje oni trovas ĝin ĉe hundeto kaj eĉ foje ĉe viro. Ĝi estas aparte bedaŭrinda pro tio, ke ĝi elprenas la kuraĝon el persono tiel kiel neniu alia timo povas kaj oni ne povas forrezoni ĝin kaj oni ne povas forigi ĝin en iu per hontigo. Virino kiu povus kontraŭstari la diablon mem—aŭ muson—tute senraciiga kaj perdas ĉian kuraĝon antaŭ ekbrilo de fulmo. Estas ja tre damaĝe vidi ŝian timegon.

Nu, kiel mi diris al vi, mi vekigis kun sufokata, tremanta krio “Mortimero! Mortimer!” atakanta miajn orelojn, kaj kiam mi sukcesis kolekti mian konscion mi eksidis kaj diris:

“Evangelino, ĉu vi vokis? Kio estas? Kie ajn estas vi?”

“Fermita en la botoŝranko. Ĉu vi hontas kuŝi tie kaj dormegi dum tia

terura fulmotondro furiozas?”

“Nu, kiel iu povas honti dum ĝi dormas? Tio estas kontraŭ la racio; homo tute ne povas honti dum la dormado, Evangelino.”

“Vi neniam penas, Mortimero, vi scias ja bone ke vi neniam penas.”

Mi aŭdis sufokatajn esplorojn.

Tiu sono mortigis la akran diron kiu estis sur miaj lipoj kaj mi ŝanĝis ĝin al:

“Mi bedaŭras, kara, mi ja vere bedaŭras. Mi neniam intencis agi tiel. Revenu kaj—”

“Mortimero!”

“Ĉielo! kio estas, mia kara?”

“Ĉu vi estas efektive ankoraŭ en tiu lito?”

“Nu, certe.”

“Venu el ĝi tuj. Mi opinius ke vi iom zorgus pri via vivo, pro mi kaj la infanoj, se ne pro vi mem.”

“Sed, mia amata—”

“Ne parolu al mi, Mortimero. Vi scias ke nenia loko estas tiel danĝera kiel lito en tia terura fulmotondro—ĉiuj libroj tion diras—sed vi volas kuŝadi tie kaj intence forĵeti vian vivon—oni ne scias kial, se ne estas por argumenti kaj argumentadi kaj—”

“Sed, mia Dio, Evangelino, mi *ne* estas en la lito plu. Mi—”

La frazo estis interrompita de subita ekbrilego de fulmo, sekvata de timoplena krieto el Sinjorino McWilliams kaj terura bruego de tondro.

“Jen! Vi vidas la rezultaton. Ho, Mortimer, kial ajn vi povas esti tiel malpia kaj blasfemi je tia tempo?”

“Mi ne blasfemis. Kaj tio neniel estis rezultato. Ĝi estus okazinta tutsame, se mi ne dirus vorton; kaj vi scias bone, Evangelino—almenaŭ vi devus scii—ke kiam la atmosfero estas ŝargita per elektriko—”

“Ho jes, nun argumentu ĝin, kaj argumentegu, kaj argumentadu! Mi ne komprenas kial vi povas tiel agi, kiam vi scias ke ne estas unu fulmoŝirmilo sur la domo, kaj viaj malfeliĉaj edzino kaj infanoj estas absolute sen protekto. *Kion ajn* vi faras?—vi bruligas alumenton je tia tempo? Ĉu vi estas *tute* freneza?”

“Nu, virino, kiel tio povas malutili? La ĉambro estas tiel malluma kiel la teorioj de la Idistoj kaj—”

“Estingu ĝin, tuj, tuj! Ĉu vi volas ke ni ĉiuj pereu? Vi ja scias ke nenio tiel altiras la fulmon kiel lumo. (*Fzt!—kraŝ! buum—bolumm—buum—buum!*) Ho, aŭdu tion! Vi nun povas kompreni kion vi faris!”

“Ne, mi *ne* komprenas kion mi faris. Alumeto povas altiri la fulmon eble, sed ĝi certe ne kaŭzas ĝin, mi volas veti ke ne. Kaj ĝi altiris ĝin tre mallerte tiun fojon, ĉar, se tiu pafado celis mian alumenton, estis treege mallerta pafado, laŭ proksimume neniam da trafoj el miliono da pafadoj, mi opinias. Nu, ĉe la pafkampo tia pafado—”

“Hontu, Mortimero! Jen ni staras en la apudesto de la morto mem, sed tamen en tia solena momento vi estas kapabla paroli tiel malpiajn vortojn. Se vi ne deziras—*Mortimer!*”

“Nu?”

“Ĉu vi diris preĝon hodiaŭ vespere?”

“Mi—mi intencis, sed mi komencis kalkuli kiom estas dekduoble dektri kaj mi forgesis—”

(*Fzst — buum — beruum — bumm! — baŭmbaŭm bango—SMAS!*)

“Ho, ni estas tuj pereontaj, sen ia helpo! Kiel vi povis forgesi tiel gravegan devon je tia tempo?”

“Sed ne estis tiam tia tempo. Ne estis unu nubeto en la ĉielo. Kiel mi povis scii ke estos tiom da kolerego kaj furiozo pri tiel malgranda forgeseto? Kaj mi opinias ke estas maljuste riproĉi min pro tio, ĉar ĝi okazas tiel malofte, mi ja ne forgesis de kiam mi kaŭzis la tertremon, antaŭ kvar jaroj.”

“Mortimer! Kion vi diras? Ĉu vi forgesas la flavafebron?”

“Mia kara, vi ĉiam riproĉas min pri la flavafebro, kaj mi opinias ke estas tute maljuste. Oni eĉ ne povas telegrafi al Memfizo sen ke oni ripetu intere la depeŝon, kiel do ia malgranda peketo povas agi tiel malproksimen? Mi toleras riproĉojn pri la tertremo ĉar ĝi estis proksima, sed mi tute ne intencas esti responda pri ĉia malbenita katastrofo—”

(*Fzst! — BUUM — beruum — buum! buum! — BANGO!*)

“Ho ve! Mi scias ke ĝi trafis ion, Mortimer. Ni neniam vidos la lumon de nova tago kaj mi deziras ke vi memoru, kiam ni estas formortintaj, ke viaj malpiaj diroj—*Mortimer!*”

“*NU?* Kio estas nun?”

“Via voĉo sonas kvazaŭ—Mortimer, ĉu vi efektive staras antaŭ tiu malfermita kameno?”

“Mi estas ja kulpa pri tiu grava krimo.”

“Foriru de ĝi tuj, tiun ĉi momenton. Vi ŝajne deziregas altiri detruon sur nin. Ĉu vi ne scias ke ne ekzistas ia pli bona portanto de fulmo ol malfermita kameno? Kie *vi nun* estas?”

“Mi estas apud la fenestro.”

“Ho Dio, ĉu vi estas absolute freneza? For de tie, rapide! Eĉ la malgrandaj infanoj scias ke estas plej danĝere stari apud fenestro dum fulmotondro. Ho,



mi ja scias ke mi neniam vidos alian tagon. Mortimer!"

"Jes?"

"Kio kaŭzas tiun kraketadon?"

"Mi."

"Kion vi faras?"

"Mi penas trovi la supron de mia pantalono."

"Tuj, forjetu ĝin! Mi ja kredas ke vi intencis surmeti tiun veston je tia terura tempo, tamen vi scias bone ge *ĉiuj* aŭtoritatoj konsentas ke lanaj ŝtofoj altiras la fulmon. Ho ve, ne estas sufiĉe ke niaj vivoj estas en danĝero de naturaj kaŭzoj, sed vi ankaŭ devas fari ĉion kion vi povas elpensi por pligrandigi la danĝeron. Ho, *ne* kantu! Kion vi intencas?"

"Nu, kial mi devas ne kanti?"

"Mortimero, mi diradis al vi centfoje kantado kaŭzas vibradojn en la atmosfero kiuj interrompas la fluadon de la elektriĝo kaj—Pro kio ajn vi malfermas la pordon?"

"Nu, virino, ĉu estas malutilo en tio?"

"*Malutilo!* Estas *morto* en ĝi! Iu kiu iam esploris la aferon scias ke krei blovadon estas inviti fulmon. Vi ne fermis ĝin bone; fermu ĝin tute, aŭ ni ĉiuj estos detruataj. Ho, estas terurege esti kunfermita kun frenezulo je tia tempo. Mortimero, *kion* vi faras?"

"Nenion. Mi nur fluigas la akvon. La ĉambro estas sufokate varmega kaj senaera. Mi volas bani miajn vizaĝon kaj manojn."

"Vi certe jam perdis la restaĵon de via saĝo! Dum la fulmo trafas ian alian substancon *unufoje*, ĝi trafas la akvon *kvindekfoje*. Ne fluigu ĝin. Ho, nenio en la mondo povas savi nin. Ja ŝajnas al mi ke—Mortimero, kio estis?"

"Estis malbenita pentraĵo. Mi faliĝis ĝin."

"Vi estas do apud la muro. Mi neniam aŭdis pri tia senprudenteco. Ĉu vi ne

scias ke estas neniam pli bona portanto de fulmo ol muro? Iru for de tie, tuj. Kaj vi preskaŭ blasfemis, ankaŭ. Ho, kiel vi povas esti tiel terure malpia, kun via familio en tia danĝero? Mortimer, ĉu vi mendis plumomatracon, kiel mi petis al vi?"

"Ne, mi forgesis."

"Forgesis! Tio eble kostos al vi la vivon. Se vi havus nun plumomatracon, vi povus sterni ĝin en la mezo de la ĉambro kaj, kuŝante sur ĝi, vi estus tute sendanĝera. Venu tien ĉi, venu tuj, antaŭ ol vi povas fari iajn aliajn malsaĝaĵojn."

Mi ekprovis, sed la mallarĝa ŝranko ne povis enhavi ambaŭ nin kun fermita pordo, sen ke ni volus sufokiĝi. Mi enspiregis pene dum iom da tempo, tiam elpuŝis min. Mia edzino diris—

"Mortimero, ni devas fari ion por protekti vian vivon. Donu al mi tiun germanan libron kiu estas sur la kamembreto, kaj kandelon, sed ne bruligu ĝin; donu al mi alumeton, mi bruligos ĝin tie ĉi. Tiu libro havas informojn pri protekto kontraŭ la fulmo."

"Mi akiris la libron, je kosto de vazo kaj kelkaj aliaj rompeblaj kozoj, kaj la sinjorino enfermis sin kun sia kandelo. Mi havis momente pacon, tiam ŝi vokis—"

"Mortimero, kio estis?"

"Nur la kato."

"La kato! Ho, detruo! Kaptu ĝin tuj kaj enfermu ĝin en la komodo. Rapidu, mia amata, katoj estas *plenaj* de elektriĝo. Mi scias ke miaj haroj griziĝos pro la teruraj danĝeroj de tiu ĉi nokto."

Mi ree aŭdis la sufokatajn plorojn. Sen tio mi tute ne estus entrepreninta tian senprudentan ĉason en la mallumo.

Tamen mi komencis mian taskon, kontraŭ seĝoj kaj ĉiaj ajn ĝenaĵoj, ĉiuj mal-

molaj, kaj preskaŭ ĉiuj kun akraj anguloj, kaj fine fermis la kateton en la komodon je kosto de proksimume kvarcent dolaroj per rompitaĵoj meblaĵoj kaj kontuzitaj maleoloj. Tiam tiuj vortoj venis el la ŝranko—

“Oni diras ke estas plej sendanĝere stari sur seĝo en la mezo de la ĉambro, Mortimero, kaj la piedoj de la seĝo devas esti izoligitaj per neportantoj de elektriĝo. Tio estas, vi devas meti la piedojn de la seĝo en glasojn (*fzst!—boom—bango!—smaŝ!*) Ho, aŭdu tion! Rapidu, Mortimero, antaŭ ol ĝi trafos vin.”

Mi sukcesis trovi kaj akiri la glasojn. Mi akiris la lastajn kvar—rompis la aliajn. Mi izoligis la seĝojn kurojn kaj atendis pluajn instruojn.

“Mortimero, oni diras, *Wahrend eines Gewitters entferne man Metalle, wie z. B., Ringe, Uhren, Schlüssel, etc., von sich und halte sich auch nicht an solchen Stellen auf, wo viele Metalle bei einander liegen, oder mit andern Körpern verbunden sind, wie an Herden, Öfen, Eisengittern u. dgl.* Ĉu tio signifas ke oni devas teni metalojn *apud* si aŭ *for* de si?”

“Nu, mi apenaŭ scias. Ĝi ŝajnas iom konfuza. Germanlingva konsilo estas ĉiam konfuza. Tamen, mi opinias ke tiu frazo estas plejparte en la dativo, kun iom da genitivo kaj akuzativo enmiksitaj, ŝance; mi do opinias ke la signifo estas ke oni devas teni metalojn *apud* si.”

“Jes, tio estas kompreneble prava; ili estas kvazaŭ fulmoŝirmiloj. Surmetu vian kaskon de brulestingisto, Mortimer, tio estas preskaŭ tute el metalo.”

Mi trovis kaj surmetis ĝin—tre peza kaj malkomforta kapvesto dum varmega nokto en senaera ĉambro. Eĉ mia noktovesto ŝajnis pli multe da vestaĵo ol mi efektive bezonis.

“Mortimero, mi opinias ke via mez-

korpo devas esti protektata. Vi buku vian milician sabron ĉirkaŭ vian talion.”

Mi obeis.

“Nu, Mortimero, vi devas iamaniere protekti viajn piedojn. Surmetu viajn spronojn.”

Mi tion faris, silente, kaj subpremis la koleron kiel eble plej bone.

“Mortimero, oni diras, *Das Gewitter lauten ist sehr gefährlich, weil Glocke selbst, sowie die durch das Lauten veranlasste Luftzug und die Höhe des Thurmes den Elitz anziehen konnten.* Mortimer, ĉu tio signifas ke oni devas sonorigi la preĝejajn sonorilojn kontraŭ fulmotondro?”

“Jes, verŝajne, se tio estas la estinta participio de la nominativa kazo ununombra, kaj mi kredas ke ĝi ja estas. Jes, mi opinias ke pro la alteco de la preĝejo kaj la senesto de *Luftzug* estus tre danĝere (*sehr gefährlich*) ne sonorigi la sonorilojn dum fulmotondro, kaj ankaŭ, kompreneble, la vortaranĝo mem—”

“Ne zorgu pri tio, Mortimero, ne malŝparu valoregan tempon per parolado. Akiru la sonorilon, ĝi estas proksime en la salono. Rapidu, kara Mortimer, ni estas preskaŭ eksterdanĝeraj. Ho, mi ja kredas ke ni spite ĉio estas savontaj!”

Nia somera dometo staras sur supro de altaĵo, rigardanta en valon. Kelkaj farmodomoj estas proksimaj, la plej proksima for kelkajn centojn da metroj.

Nu, mi starante sur la seĝo, estis sonoregiginta tiun teruran sonorilon dum sep—ok minutoj, kiam subite la fenestro estis malfermen puŝataj de ekstere, kaj brilega lanterno aperis, sekvata de raŭka demando—

“Per Dio, kio estas tie ĉi?”

La fenestro estis plena de homaj kapoj, kaj la kapoj estis plenaj de okuloj kiuj rigardis mirege al mia noktovesto kaj miaj militistaj iloj.

Mi lasis la sonorilon fali, desaltis de la seĝo en plena konfuzo kaj diris—

“Estas nenio, amikoj, nur iom da maltrankvileco pro la fulmotondro. Mi penis protekti nin kontraŭ la fulmo.”

“Tondro? Fulmo? Nu, Sinjoro McWilliams, ĉu vi estas freneza? Estas bela stelluma nokto, ne estis ia fulmotondro.”

Mi rigardis el la fenestro, kaj estis tiel surprizata ke mi apenaŭ povis paroli. Mi diris—

“Mi ne povas kompreni tion ĉi. Ni klare vidis la ekbrilojn de la fulmo tra la kurtenoj kaj aŭdis la tondron.”

Unu post alia tiuj homoj kuŝigis sin sur la teron por ridegi—kaj du mortis. Unu el la travivintoj diris—

“Estas bedaŭrinde ke vi ne malfermis la pordon por rigardi al la kontraŭa monteto. Vi aŭdis la bruegon de kanono; vi vidis la ekbrilojn. La telegrafo alportis sciigon je noktomezo ke Garfield estas elektita prezidanto. Ni pafadis kanonon por montri nian ĝojon, jen la kaŭzo de via fulmotondro.”

Jes, Sinjoro Twain, kiel mi diris antaŭe, diris Sinjoro McWilliams, la reguloj por savi homojn kontraŭ la fulmo estas tiel multegaj kaj tiel bonaj ke estas ja al mi plej nekompreneble kiamaniere iu ajn estas iam trafita de la fulmo.

Tiel dirinte, li kolektis siajn valizon kaj ombrelon, ĉar la vagonaro estis tainginta lian urbon.

### LA DUDEKTRIA PSALMO.

Laŭ la petado ke kelkaj samideanoj, ni enpresas la esperantan tekston de la dudek-tria psalmo, tradukitan de Zamenhof el la hebrea originalo:

*Psalmo de Davido.* Dio estas mia paŝtiŝto, mi mankon ne havos.

Sur verdaj herbejoj Li ripozigas min, apud trankvilaj akvoj Li kondukas min.

Li kvietigas mian animon, Li kondukas min laŭ la vojo de la vero, pro Sia nomo.

Eĉ kiam mi iros tra valo de mallumo, mi ne timos malbonon, ĉar Vi estas kun mi; Via bastono kaj apogiĝilo trankviligos min.

Vi kovras por mi tablon antaŭ miaj malamikoj; Vi grasigas per oleo mian kapon, mia pokalo estas plenigita.

Nur bono kaj favoro sekvos min en la daŭro de mia tuta vivo, kaj mi restos en la domo de Dio multajn jarojn.

### ORIGINALA VERKARO ESPERANTA

CLARENCE L. DEAN

**O**FTE troviĝas plendoj en la gazetoj esperantistaj kaj neesperantistaj pri ia pretendita manko de originalaj verkoj esperantaj. Ĉu tiuj plendoj estas vere pravigitaj? La lingvo Esperanto estas tre juna kaj kiel efektive perfektita esprimo jam havas nur dudekjarojn de ekzistado. Ĉu ĝi ne vere havas sufiĉe grandan verkaron? Neniu nacia lingvo posedis grandajn verkojn originalajn eĉ post jarcentoj de vivado. La Usona nacio ekzemple uzante lingvon jam pretigitan kaj perfektigitan kiel literaturan ilon, la anglan, ne produktis ian grandan verkon vere originalan dum la daŭro de kvindek jaroj de nacia ekzistado. Kial oni demandas al la lingvo Esperanto ke kontraŭ ĉiuj historiaj ekzemploj ĝiaj adeptoj amasege verku, tuj post ĝia naskiĝo, originalan literaturon? Tamen verdire literaturo originala ne tute mankas al ni Esperantistoj. Ni nun havas kaj jam antaŭ kelkaj jaroj havis sufiĉe ŝatindan originalan verkaron.

Tute nature la plimulto de niaj libroj estas tradukaĵoj de konataj nacilingvaj verkoj, sed samtempe kelkaj el tiuj tradukaĵaj havas grandan literaturan valoron, sendepende de la beletrikistaj kaj

fantaziaj meritoj de la originaloj. Necese estas citi nur la tradukaĵojn de "Hamleto" farita de nia Majstro mem, de la "Eneido" de Dro. Vallienne, kaj de "La Faraono" de Dro. Bein (Kabe). Vere ne estas malgranda atesto al la beletrikistaj ecoj de iu lingvo ke ĝi sufiĉas por produkti tiajn tradukojn. Sed ne kalkulante la amason de vere valoraj tradukaĵoj Esperantaj, nia lingvo posedas sufiĉe remarkindan nombron da atentindaj verkoj originalaj. Oni nepre devas legi ilin antaŭ ol aserti ke tiaj verkoj tute mankas al nia kara lingvo.

Meritas unuan citon unu el la plej malnovaj esperantaj verkoj, ŝatata de ĉiuj bonaj esperantistaj. Kie ekzistas plibone rezonata kaj pli bonstila filologia verko ol "Ĝesenco kaj Estonteco de la Lingvo Internacia," enpresita en la "Fundamenta Krestomatio," eble verkita de nia majstro mem, kaj jam bone tradukita angle, france, ruse, ktp.? Se oni interesiĝas pri lingvaj demandoj, ekzistas ankaŭ aliaj meritplenaj filologiaj verkoj, aŭ verketoj, esperante verkita, ekzemple tiuj de Profesoro Ch. Lambert, el Dijon, Franclando, eldonitaj libroforme sub la titolo "Bukedo," de kiuj precipe citindaj estas la artikoloj "Vorto kaj Ideo" kaj "Vivo kaj Morto de Lingvo." Post legado de la tri suprecititaj disertacioj oni ne povas diri ke la lingvo Esperanto ne taŭgas por verki valorajn filologiajn traktatojn, aŭ ke tiaspecaj verkoj mankas al ĝi.

Aliaj sciencaj verkoj esperantaj de nemalŝatinda valoro estas la du matematikaj libroj de A. Dombrowski, "Pri unu Speco de Kurbaj Linioj" kaj "Pri Novaj Trigonometraj Sistemoj," la dua jam honorigita per franca traduko. Ne mankas aliaj seriozaj disertacioj originale esperante verkita, el kiuj "Homa Radiado" de Rektoro Boirac, prezidanto de

nia lingva komitato, estas bona ekzemplo de zorge pensita kaj bonstile skribita verketo. Meritas citon ankaŭ "Evolucio de la Religia Ideo" de Dro. Vallienne, kaj "La Terioj de la Jonoj" de Dro. Halte.

Dro. Vallienne jam montris grandan diligentecon kiel originala esperantista verkisto. Krom la suprecitita broŝuro, li jam verkis sufiĉe grandan nombron de fantaziaj libroj, kies ĉefoj estas la du romanoj, "Kastelo de Prelongo" kaj "Ĉu Li?" Neleginte tiujn du verkojn de la imago, neniu rajtas diri ke vere ŝatindaj originalaj verkoj esperantaj ne ekzistas. Spite la temoj traktitaj, temoj kiuj malkovras la francan originon de la aŭtoro, kaj kiujn anglaj aŭtoroj ne kurkaĝas trakti, kaj spite kelkaj okazintaĵoj priskribitaj kiujn angla legantaro tre malŝatas vidi traktataj en romanoj ambaŭ romanoj havas nemalgrandan valoron kaj intereson. Multaj malpli valoraj nacilingvaj verkoj atingas grandan sukceson kaj kritikan aproban. Sino. Vallienne ankaŭ bone skribas esperante, kaj estas aŭtorino de duakta komedio, "La Gasto," kiu estas vere leginda, montranta bonan ekzemplon de ridinda situacio, lerte disvolvigita kaj bonstile elverkita.

La ĝisnuna esperantista literaturo estas speciale riĉa per bonaj komedietoj kaj monologoj. "Edziĝo" de V. N. Devjatnin, "La Edziĝo Malarangita" de Vincente Inglada, kaj "La Rompantoj," kvin tre plezurigaj monologoj de Pujula-Valjes, aparte meritas citon, sed nemalgravaj estas ankaŭ "Bonegaj Atestoj" de R. Paillet, "Dektriopie" de Alb. Gallois, "Duonsurda," de Johanino Flourens, kaj "La Renkonto" de Marie Henkel, tiu-ĉi lasta ludita dum la kvara kongreso en Dresdono, kaj eldonita en "Tri Komedioj." Ekzistas ja aliaj, kaj la nuntempa produktado de tiaj verkoj estas

sufiĉe granda, kaj sekve ilia nombro ĉiam kreskadadas. Dro. Vallienne ankaŭ skribis verkon dialogforman, "Por Kaj Kontraŭ Esperanto," kiu kvankam ĝi ne estas vere teatraĵo, sed propagandio, tamen posedas neneigeblan meriton.

El la pli malnovaj esperantaj verkoj estas kelkaj neforgeseblaj, kvankam mallongaj. Bedaŭrine ili grandaparte estas nun elĉerpitaj; espereble oni baldaŭ represigos ilin kune kun kelkaj malnovaj tradukaĵoj nun ankaŭ elĉerpitaj, kies simpla kaj klara stilo meritas legadon kaj imitadon. Maltrafis veran plezuron ĉiu ne leginte "Krajleviĉ Marko" de Absegus kaj "En la Brikejo" de J. Wasniewski. Ĉituj kune kun "Du Mirrakontoj" de O. Zeidlitz, "El la Vivo de Esperantistoj" de V. Stankieviĉ, "Arturo" kaj "Nevola Mortiginto" de Devjatnin sole sufiĉus senigi la esperantistaron, eĉ en la jaro 1898 je la riproĉo ne havi ŝatindan originalan verkaron.

La lasta citita estas verse skribita kaj estas nur unu el multaj bonegaj verkoj rimaj, kiujn la lingvo posedas. La bonegaj poemoj de Dro. Zamenhof estas konataj de tiuj esperantistoj kaj ne estas necese denove rememorigi ilin. Tiuj kiuj ŝatas poemojn trovos veran plezuron legante la du librojn de la Plena Verkaro de Devjatnin, kontenantaj, krom "Nevola Mortiginto," "Arturo" kaj "Edziĝo," jam cititaj, kaj diversaj tradukoj, la jenajn poemojn: "Ludilo de Sorto," "Episkopo" (drama skizo en versoj), kaj multajn bonajn mallongajn versaĵojn. "La Liro de la Esperantistoj," kolekto de malnovaj versaĵoj esperantaj eldonita de A. Grabowski, en kiuj multaj originalaj poemoj troviĝas, havas grandan intereson pro ĝiaj vortaj kaj esprimaj enkondukaĵoj poste forlasitaj, kaj estas kiel poemaro tre leginda. "Homa Doloro" de Fez (F. Zamenhof),

"Versaĵareto" de A. Dombrowski, la originalaj poemoj de Leo Belmont enpresitaj en "Esperantaj Sonoj," kaj aliloke, "Trafendita Turo" de Th. Cart, "Urso" kaj "En Montoj" de H. Sentis kaj "Verdaj Fajreroj" (el kiuj multaj sed ne ĉiuj estas originalaj) de Romano Frenkel pligrandigas la esperantan poemaron al vere granda kvanto de konsiderindaj verkoj. Kaj tie ankaŭ la nombro de eldonitaĵoj senĉese kreskadadas.

De noveloj kaj rakontoj vere legindaj kaj bonstilaj, krom la malnovaj jam cititaj, ni havas grandan nombron. Neforgesebla estas "Perdita kaj Retrovita" de Rektoro Boirac, kiu estas agema je multaj diversaj fakoj. "La Novjara Donaco de la Ministro" de Saint Loup kaj "Triope" de la familio Fauvart-Bastoul havas specialan intereson, kvankam la esperanta stilo estas ofte tro franca, kaj ne internacie bona. Ĉiu esperantisto devas posedi kaj legi "Sep Rakontoj" de Ivan Malfeliĉulo kaj "Du Rakontoj" de D. de Rothau. De la plej novaj eldonaĵoj "La Grafo Erarinta" kaj la trio de malgrandaj rakontoj, "Naivulo," "Karabandolo la Plugisto" kaj "Fiŝkaptisto kaj Rigardanto" de F. Puĵula-Valjes meritas pro ilia interespleneco kaj bonstilo ke ĉiu ilin legu.

Ekzistas ankoraŭ multaj tiuspecaj verkoj kaj verketoj sed tute neeble estas doni kompletan liston, ĉar ĉiutage eldoniĝas pluaj. La esperantista verkistaro ne estas maldiligenta. Multaj noveloj, romanoj, romanetoj, rakontoj kaj skizoj unuarangaj enpresitaj en la revuoj esperantistaj, precipe en "La Revuo," "Lingvo Internacia" kaj "Tra la Mondo," meritas sed neniam atingis apartan eldoniĝon, kaj kelkaj naciaj gazetoj esperantistaj,—nome "British Esperantist," "Germana Esperantisto," "Časopis Českých Esperantistů," "Pola Esperantisto,"

“Roma Esperantisto,” “Suno Hispana,” —entenas ofte skizojn kaj artikolojn originalajn grandvalorajn. Eĉ multaj artikoloj pri esperantaj kaj lingvaj temoj estas tiel bele verkitaj kaj verepensitaj ke ili valoras esti konservitaj. Antaŭnelonge eldoniĝis libroforme sub la titolo “Laŭroj,” kolekto da verketoj premiitaj de “La Revuo” kaj parte antaŭe enpresitaj en tiu gazeto, el kiuj kelkaj solaj sufiĉas senrajtigi la plendojn pri manko de esperantaj originalaĵoj. La sekvo de la konata novelo de la Usona verkisto Stockton, “Ĉu la Virgulino aŭ la Tigro?” esperante verkita de Dro. S. Krukowski kaj siavice premiita de “La Revuo,” kiu espereble baldaŭ eldoniĝos libroforme kune kun esperanta traduko de la Stocktona novelo, egale meritas aprobon.

Ne komplete estus katalogo de originalaj verkoj esperantaj sen cito de humoristaj verkoj. Tiuj humoraĵoj estas originalaj ĉar kiam humoraĵo estas tradukitaj alialingve ĝi ĉiam fariĝas nova rakonteto. El notindaj esperantaj verkoj tiuspecaj “La Libro de la Humoraĵo” de Paul de Lengyel estas la plej malnova kaj samtempe la plej bona, sed tre legindaj estas ankaŭ “Cent dek tri Humoraĵoj” de A. J. Loira, “Kelkaj Floroj Esperantaj” (kvin kajeroj) de A. J. Witteryck kaj “Anekdotaro Tutmonda,” kies unua kajero jam aperis, de Ĉefcĉ. Ili estas ĉiuj tre ĝueblaj, kaj la verko de Lengyel estas valorplena kaj bonstila.

Oni devas ankaŭ memori kiel originalaj verkoj “Sintakso Esperanta” de Paul Fruictier, kaj “Franca Gramatiko por Esperantistoj” de Paul Boulet, kiuj, kvankam ili estas nur lernolibroj, estas bonegaj ekzemploj de bonstila esperantistaj skribaĵoj. Ni ne forgesu krome kelkajn diversajn librojn, ekzemple “Prozo kaj Versoj” de V. Inglada, “Malnovaj Paĝoj” eltiritaj de la malnovaj

jarkolektoj de “Lingvo Internacia,” “Perleroj Esperantaj” simile eltiritaj el “Lingvo Internacia,” “Mia Vilaĝo,” tre bela priskribo de J. Dufour, “Tra Mez-Afriko” de Komandanto Ch. Lemaire, “Unu Jaro pli Malfrue” de Thiaucourt, kelkaj de le esperante verkitaj broŝuroj lingvistikaj de Sro. de Beaufront, kaj, antaŭ ĉio, la artikoloj, leteroj kaj paroladoj de nia majstro, Dro. Zamenhof, ĉiam modeloj de penso kaj stilo.

Tiu ĉi necese nekompleta numerado sufiĉas por montri ke la aro de originalaj verkoj esperantaj estas tre honorega, apartenante al dudekjara lingvo, kaj malpravigas la plendojn pri manko de tiaj verkoj, plendojn faritajn senpripense kaj de homoj ne konintaj kaj nezorge legintaj la esperantan literaturon.

### LA ESCORIAL

**Noto.**—Ĉar multaj el niaj amikoj estas interesataj je la esperantista kunveno en Barcelona, ni tradukis la sekvantan el germana gazeto, *Fur Haus*:

La atento de la homaro estis antaŭ ne longe turnita al unu el la plej belegaj konstruaĵoj kiujn la mondo estas vidinta, kaŭze de la novaĵo pri brulo kiu pruvis sin pli grava ol estis unue supozita, kaj kiu kaŭzis grandegan difektaĵon en al plej interesa fako de tiu ĉi historia konstruaĵo. La Escorial, kiel nenia alia konstruaĵo en Hispanaŭja, rebrilas la pli fruan potencon kaj grandecon de la nacio, kaj samtempuloj nomis ĝin la “Oka Mirindaĵo de la Mondo.” Ja la Anglo, Stirling, certigis,—“Ĝi estas la plej granda arĥitektura entrepreno kiun unu sola homo estas iam elpensinta kaj elfarinta.”

Ĝi trovas sin sur la suda deklivo de la Montaro Guadarrama,—grandioza koloso el griza granito, leviĝanta el la ŝtonegoj, malhela kaj malluma kiel la apuda pej-

zaĝo. La arĥitekturistoj, Juan de Toledo kaj Juan de Herrera, starigis ĝin laŭ la ordono de Filipo la Dua (1559-84) en sekvo de religia promeso farita al Sanktulo Larenco, kies monaĥejon li devis detrui en la Batalo de Sanktulo Kventino pro militartaj kaŭzoj. Estis konstruata per elspezado de dek ses kaj duono milionoj da setoj: Filipo plie deziris fondi por si tie ĉi rifuĝejon por kvietaj horoj,—sanktejon kiu estus konforma al lia malgaja naturo plena je severa religia fervoro.

Kaj tiel, post serĉo dum du jaroj, unu loko troviĝis super la vilaĝo de Escorial, kvindek du kilometrojn de Madrido, kiu kontentigis ĉiujn postulojn de la malĝoja, silenta reĝo, kaj de la arĥitekturistoj. En memoro de la legendo pri la Sanktulo Larenco, kiu mortis kiel turmentito sur la kradrostilo, la konstruaĵo havas la formon de kradrostilo. Centoj da manoj estis bezonataj por venki la malfacilecojn de altaĵo kaj ŝtonegplena fondo, kaj Filipo mem direktis la laboradon. Lia nura apudesto ŝajnis ekspedi la konstruadon, kaj komunikis vivon kaj kreskon al ĝi. La konstruaĵo enhavas rektangulon ducent ses metrojn laŭlonge kaj cent sesdek unu metrojn laŭlarge, kaj havas unu turon ĉe ĉiu angulo. Tra dek ses malvarmaj kortoj la vojo kondukas en tiun ĉi vastan konstruaĵon, kiu estas samtempe preĝejo, palaco, monaĥejo, kolegio, kaj maŭzoleo, enhavanta en si bibliotekon, artkolekton, kaj sanktrestaĵejon. Pasante okdek ses ŝtupoj kaj mil ducent pordoj, oni preteriras kvardek altaroj, kalkulas okdek naŭ fontanojn, kaj mil cent dek unu fenestrojn kiuj malfermas ekstere, kaj mil kvincent sesdek du fenestrojn kiuj malfermas al la kortoj. La preĝejo kaj la Panteono kun la arkajo de la hispanaj reĝoj, la reĝa palaco en kiu Filipo mortis, eluzita en

korpo, sed ne en spirito, tenante la krucifikson de sia patro en siaj manoj, kun sia rigardego turnita al la belegeco de la alta altaro de la preĝejo—tiuj ĉi vidiĝas, nedetruitaj de la brulo.

La "Casa del Infante" estas detruiĝinta, la belega konstruaĵo kun la bela ĝardeno, kiu estis fondita en la dua duono de la dek-oka centjaro por la Infante Gabrielo. La monaĥejo kun la kolonoj estis precipe minacata. Tie ĉi trovas sin la elektita artkolekto kun belegaj ĉefverkoj de Ribera, de Tintoretto, de Greco, kaj de Luca Giordano. En la ĉirkaŭaĵo trovas sin ankaŭ la belega biblioteko, brilega en la riĉaj koloroj de Barocks. Ĝia ĉefa salono estas kvindek du metrojn laŭlonge kaj ĝi enhavas cent kvindek mil volumojn, el kiuj multaj estas tre neordinaraj.

La kolekto de manuskriptoj enhavas kvarmil tricent da arabaj, persaj, grekaj, kaj alia multekostaj manuskriptoj.

—M. & J. P.

Kvakero de Filadelfio negocadis kun asekurkompanio por akiri polison pri ŝipo, kiu estis ne alveninta je la atendita tempo. Antaŭ ol li ricevis de la asekurkompanio sian polison li lernis ke la ŝipo estas pereinta. Tuj la honesta kvakero skribis leteron al la kompanio: "Amikoj se ci ankoraŭ ne plenumis mian polison, lasu ĝin, ĉar hodiaŭ mi ricevis informon pri mia ŝipo." "Ho," diris la asekuristoj, "kia ruza homo! Li intencas trompi nin pri nia asekurmono." Tial ili sciigis al la honesta kvakero: "Amiko, vi estas tro malfrua je duonhoro; via poliso jam estas plenumita."

—H. Wiegand.

Oni demandis al Moliere kial en kelkaj landoj reĝidoj estas permesitaj ricevi la kronon je aĝo dekkvarjara sed edziĝi nur je dekokjara aĝo. Li respondis, "Ĉar estas pli malfacile regadi edzinon ol reĝolandon."

## PAĜO MALSERIOZA

### RUZAJ RABISTETOJ.

Knabeto enkuris bakejon en London, kaj metinte pencon sur la butikotablon time demandis: "Sinjoro, ĉu vi havas duonpencan bulkon?"

"Jes, mia vireto; jen estas unu tute varmega."

"Dankon, Sinjoro; ĉu vi volus ĝin puŝi malsupren laŭ mia dorso?"

"Malsupren laŭ via dorso, mia vireto? Kial laŭ via dorso?"

"Ĉar, Sinjoro, mi nur estas malgrandulo; kaj, se tiuj buboj eksteraj sciis ke mi havas bulkon, ili ĝin forprenus; kaj mi estas tiel malsatega, mi estas!"

"Ĉu vere? Kiel malbone! Alvenu, knabeto; jen, jen, ĝi estas, malsupren laŭ via dorso."

La knabo forkuris. Subite envenis alia, pli granda knabo, kaj kriis:

"Diru, Sinjoro, ĉu ia bubeto ĵus tie ĉi estis?"

"Jes."

"Ĉu li aĉetis duonpencan bulkon?"

"Jes."

"Kaj ĉu li petis ke vi ŝovu ĝin malsupren laŭ lia dorso, ĉar ni grandaj knaboj forprenos ĝin?"

"Jes."

"Ja, fi! Kie estas via poŝhorloĝo kaj ĉeno? Li ŝtelis ilin! Li estas ĵus preter l'angulo de l'strato."

La bakisto elĵetis sin eksteren. Tuj la knabo, kiu estas en la butikotablon, ekprenis la monokesteton kaj forkuris. Tamen la bakisto eĉ nun ne ĝuas la ŝercon!

—*Tradukis Ho Ho, 13343.*

Unu homo, tre mallaborema, ne volis ĝeni sin dirante siajn preĝojn ĉiumatene, tial li skribis ilin sur karto, pendis ĝin sur la muron de la dormĉambro, kaj nun, ĉiun matenon, kiam li vekigas, li nur montras la karton per la fingro kaj diras, "Jen miaj sentoj, ho Dio!"

Pastro, vidante kelkajn knabojn inter-

parolantaj tre fervore, alproksimiĝis kaj demandis al ili, "Pri kio vi diskutas, miaj knaboj?" Ili respondis, "Ni vetkonkursas kaj tiu kiu povos rakonti la plej nekredindan mensogon gajnos la hundeton tie." "Ho, miaj knaboj, ĉu vi ne konas ke estas ja hontinde mensogi? Kiam mi estis samaĝa kiel vi mi neniam mensogis." La knaboj aŭskultis mire kaj fine unu diris, "Jen estas la hundo, sinjoro; vi estas gajninta la premion."

Unu germana muzikisto ĝemis pri sia sorto. "Mi ludas la pikolon," li diris. "Kiam nia muzikistaro ludis antaŭ la granda caro de Ruslando, tiu ekkriis, "Kiel belega muziko! Plenigu iliajn instrumentojn per oro." La tamburegisto riĉegiĝis, la kornetisto riĉiĝis, sed mi—mi ja ludas la pikolon! Poste ni ludis antaŭ la Malsanulo de Eŭropo, la sultano de Turkujo. Tiu kriigis kiam li aŭdis nin, "Kiel abomena bruego! Puŝu iliajn instrumentojn malsupren en la gorĝojn." Nu, la buŝo de la tamburegisto ne estis egala al sia tamburego; la kornetisto ankaŭ ne povis engluti sian korneton, sed mi—mi ludas la pikolon!"

—*A. A. Coates.*

*Instruisto*, (al siaj lernantoj) Klarigu al mi la vortojn antaŭhieraŭ, postmorgaŭ, hieraŭ, morgaŭ kaj hodiaŭ.

*Lernantoj*, (silentadas).

*Instruisto*—Nu, estas tamen tre simple. Antentu, kaj mi klarigos al vi. Antaŭhieraŭ estas hieraŭ hieraŭ; postmorgaŭ estos morgaŭ morgaŭ; hieraŭ estas hieraŭ hodiaŭ, antaŭhieraŭ morgaŭ, kaj estis morgaŭ antaŭhieraŭ; morgaŭ estos hieraŭ postmorgaŭ, estas morgaŭ hodiaŭ kaj postmorgaŭ hieraŭ; hodiaŭ fine estos hieraŭ morgaŭ, antaŭhieraŭ postmorgaŭ, estis morgaŭ hieraŭ kaj postmorgaŭ antaŭhieraŭ. Ĉu vi nun komprenas?

—*Carl Heyl.*



# EN ESPERANTA RITMO

## FASTADO DE HIAVATO.

Legendo de amerika indiana gento pri la kreo  
de la maizo. El angla de *Longfellow*

tradukis

CHARLES E. BAKER

Nun vi lernos kiel Hiavato  
Preĝis fastadante en arbaro,  
Preĝis ne por plua ĉaslerteco,  
Nek ruzeco kiel fiŝkaptisto,  
Nek por viktorio en milito,  
Nek honoro kiel militisto,  
Sed por pliboniĝo de la gentoj,  
Por ke la homaro prosperiĝu.

Li unue ĉe la sabla bordo  
De Superioro en arbaro  
Tipiegon por fastad' konstruis  
En la lunmonato kiu vidas  
Reverdiĝon de la foliaro,  
Kie viziante kaj sonĝante  
Dum sep tag' kaj noktoj li festadis.

La unuan tagon de la fasto,  
Tra arbaro verda li vagadis;  
Vidis li la kariakon salti  
El la arbeto kaj forkuri,  
Vidis la leporon en la kavo,  
Aŭdis tetron sur falinta trunko  
Forte batadantan ĝin flugile,  
La sciuron en la arba kavo  
Sonigantan sian ar' de glanoj,  
Vidis li kolombojn nestkonstrui  
Inter branĉoj de la pinarbegoj,  
Kaj flugantan norden anseraron  
Kriegantan alte en aero.

“Ho Sinjoro,” kriis li malĝoje,  
“Ĉu necese estos ke la homoj  
Por vivad' de tiuj ĉi dependu?”

Dum la dua tago de la fasto,  
Laŭ margeno verda de rivero  
Li vagadis kaj tra gramenejo.

Vidadinte la lagrizan herbon,  
Vakinion kaj la grosarbeton,  
Fragoherbon kaj la vinberarbon  
Kiu rampas tra la alnaj branĉoj  
Bonodorigante la aeron,  
Li malĝoje kriis, “Ho Sinjoro!  
Ĉu necese estos ke la homoj  
Por vivad' de tiuj ĉi dependu?”

Dum la tria tago de la fasto,  
Ĉe la lago sidis li pensante,  
Rigardante en la puran akvon.  
Vidadinte la saltantan sturgon  
Displaŭdantan kiel perdisketojn  
Gutojn el la travidebla akvo,  
Kaj la flavan perkon naĝadantan  
Kiel sunradio en la akvo,  
La ezokon kaj aliajn fiŝojn,  
Li malĝoje kriis, “Ho Sinjoro!  
Ĉu necese estos ke la homoj  
Por vivad' de tiuj ĉi dependu?”

Dum la kvara tago de la fasto  
Hejme kuŝis li ellacigite,  
Sur kuŝejo el folioj sekaj  
Ombre viziante kaj revante  
Rigardante tra palpebroj lacaj  
La pejzaĝon ŝajne sin turnantan,  
La rebrilon de la lagsurfaco,  
La belecon de la sunsubiro.

Kaj ekvidis li junul' vestitan  
Verde-flave veni tra krepusko  
El la gloro de la sunsubiro,  
Kun plumegoj verdaj sur la frunto,  
Kaj hararo de koloro ora.

En la enirejo staradante,  
Longe, li rigardis kompateme  
Hiavaton rimarkante lian  
Maldikecon de vizaĝ' kaj formo;  
Kaj per ton' simila al blovado  
De la Suda Vento tra branĉaro,  
Diris li, “Ho mia Hiavato,  
La preĝado via jam aŭdiĝis  
Supre en ĉielo ĉar vi preĝas,

Tute malsimile al aliaj,  
Nek por plua lerto de ĉasisto,  
Nek ruzeco kiel fiŝkaptisto,  
Nek por viktorio en milito,  
Nek honoro kiel militisto,  
Sed por pliboniĝo de la gentoj,  
Por ke la homaro prosperiĝu.

“De l’ Reganto de la Viv’ sendite,  
Mi, Maizo! homamiko venas  
Por averti vin kaj vin instrui  
Kiel agi por ke vi labore  
Gajnu ĉion kion vi deziris.  
De la lito via vin eklevu,  
Kaj ekstere kontraŭ mi baraktu!”

Pro malsat’ malforta, Hiavato  
Saltis de la lito el folioj,  
Kaj el la tipio jam malluma  
En la sunsubiran ruĝiĝegon  
Elveninte, baraktadis forte  
Kontraŭ Monadamino la junulo.  
Lin tuŝante Hiavato sentis  
Novan forton en la koro bati,  
Kaj espero kaj kuraĝo novaj  
Ĉiun fibron de la korp’ trafuis.

Tiel ili tie baraktadis  
En la gloro de la sunsubiro,  
Hiavato desplifortigante  
Ju pli longe ili baraktadis,  
Ĝis alveno de la nokto kiam  
La ardeo el la pinoj kriis  
Laŭte pro doloro kaj malsato.

“Por la nuno tio ja sufiĉas,”  
Diris Mondamino kun rideto,  
“Morgaŭ tamen ĉe la sunsubiro  
Tiam mi revenos, vin por provi.”  
Parolinte li ekmalaperis;  
Ĉu malsupren kiel la pluveroj  
El la nuboj sur la ter’ falintaj,  
Aŭ ĉu supren kiel la nebulo,  
Hiavato vidis ne, nek sciis,  
Vidis nure ke li malaperis  
Lin lasante sola kaj svenanta,  
Kun nebulaŝita lag’ malsupre  
Kaj astraro sin turnanta supre.

. La morgaŭon kaj la postmorgaŭon,  
Dum la suno tra l’ ĉiel’ pasinte  
Kiel ruĝa kaj brulanta karbo  
El tipio de la Grandanimo,

Kuŝas okcidente sur la akvo,  
Venis Mondamino por la provo,  
Por barakti kontraŭ Hiavato;  
Venis li silente kiel roso,  
Kiu el aero nevidebla  
Elveninte, tien malaperas,  
Ricevante formon sur la tero,  
Sed videbla al neniuj homoj  
En alveno kaj en malapero.

Kaj trifoje ili baraktadis  
En la gloro de la sunsubiro  
Ĉe la bordo de la lag’ ĝis kiam  
La mallumo ĉirkaŭ ili falis,  
Kaj ardeo el la sia nesto  
Soniginte krion de malsato,  
Mondamino paŭzis por aŭskulti.

Alta kaj belega jen li staras  
En vestaro sia flave-verda;  
La plumaro sur la kapo movas  
Laŭ la lia en- kaj elspirado,  
Kaj la ŝvito de la baraktado  
Pendos kiel roso del’ vizaĝo.

Kaj ekdiris li, “Ho Hiavato!  
Vi bravege estas baraktinta,  
Kaj el la ĉielo rigardante  
La Reganto de la Vivo vidis,  
Kaj pro la kuraĝo via, donos  
Ke vi morgaŭ super mi triumfos.

“Morgaŭ estos la barakto fina,  
Estos via fina fasta tago.  
Min vi venkos kaj malsuprenigos;  
Faru vi por mi el tero liton,  
Kie min la pluvo malsekigos  
Kaj la suno povos min varmigi;  
Min senigu je la miaj vestoj  
Kaj la plumoj super mia kapo,  
Min kuŝigu en la teran liton  
Kiun jam vi fosos, kaj tiame  
Ĝin moligu supre kaj ĉirkaŭe.

“Ne permesu vi ke io venu  
Por defekti min dum mi dormados;  
Gardu min precipe de la korvo;  
Gardu min ĝis kiam mi vekigos  
Kaj elsaltos el la tera lito,  
Saltos en la brilon de la suno.”

Li dirinte tion malaperis;  
Tre trankvile dormis Hiavato,

Sed li aŭdis malĝojeman plendon  
 De la antrostomo sidadanta  
 Sole sur la supro de l' tipio,  
 Aŭdis rivereton per nuĝeto  
 Parolantan al la arbarego,  
 Aŭdis sopiradon de la branĉoj  
 Pro la trablovado de la ventoj,  
 Aŭdis ĉion kiel oni aŭdas  
 Voĉojn malproksimajn dum songado:  
 Tre trankvile dormis Hiavato.

La morgaŭon venis la avino,  
 En la-sepa tago de la fasto,  
 Kunportante nutron por la nepo,  
 Petegante kaj plorante tial  
 Ĉar ŝi timis ke li eble mortos  
 De malsato antaŭ la finiĝo,  
 Ke mortiga estos la fastado.

Sed li ĝin nek tuŝis nek gustumis;  
 Diris, "Nur atendu ĝis kiam  
 Subirinta estos jam la suno,  
 Kaj la mallumiĝo falos teren,  
 Kaj ardeo el la marĉ' kriante  
 Nin sciigos ke la tago finis."

Hejmen ploregante la avino  
 Iris malrapide, malĝojante  
 Pro timigo ke la nepo mortos  
 De malsato antaŭ la finiĝo,  
 Ke mortiga estos la fastado.  
 Dume li sidadis atendante  
 Lace la alvenon de l' junulo,  
 Ĝis vespero kiam la ombraĵoj  
 Plilongiĝas al la oriento,  
 Kaj la suno tra l' ĉiel' pasinte  
 Falas okcidente en la akvon,  
 Restas flosiĝanta sur la lago,  
 Kiel la aŭtun' folio ruĝa  
 Falas kaj flosiĝas sur la akvo,  
 Falas kaj malsupren malaperas.

Kaj rigardu! Juna Mondamino,  
 Kun hararo bulka kaj rebrila,  
 Kun vestaro lia verda, flava,  
 Kun plumaĵo lia longa lustra,  
 Ekstarante ĉe la enirejo,  
 Faris signon kies la signifo:  
 "Venu vi eksteren kaj baraktu!"  
 Kvazaŭ promenanta dormetante,  
 Pala kaj lacega sed maltima,  
 Hiavato lasis la tipion  
 Por barakti kontraŭ Mondamino.

Ĉirkaŭ lia kapo sin turnadis  
 La arbaro kaj ĉielo kune,  
 Kaj la forta kor' en lia brusto  
 Saltis kiel sturgo retkaptita  
 Saltas por ekrompi la kaptilon.  
 Kiel fajra rondo ĉirkaŭanta  
 Flamas nun la ruĝa horizonto,  
 Kaj cent sunoj el la ruĝa brilo  
 Ŝajnas rigardantaj la barakton.

Sed subite sur la verda torfo  
 Tute sole staras Hiavato  
 Spiregante pro la ekzercego,  
 Palpitante pro la baraktado;  
 Kaj antaŭe sur la gramenejo  
 Nespirante kuŝas la junulo;  
 Kun plumar' ŝirita, kaj hararo  
 Sen aranĝo, kaj la verdaj vestoj  
 Ĉifonaĝigitaj, li valviva  
 Kuŝas en la sunsubira brilo.

Kaj la viktoria Hiavato  
 Faris tombon kiel ordonite;  
 Malvestinte kaj senplumiginte  
 Mondaminon lin lo enterigis.  
 Lin kovrinte tiam li moligis  
 La supraĵon supre kaj ĉirkaŭe;  
 Kaj denove la ardeo kriis  
 El la marĉ' dolore pro malsato.

Hejmen nun promenas Hiavato  
 Al la tipiigo de Nokomo,  
 Kaj finita estas lia fasto.  
 Sed la lokon de la baraktado  
 Li tenadis ĉiam en memoro,  
 Kaj la tombon kie Mondamino  
 Dormas en la pluvo kaj la brilo,  
 Kie disemite la vestaro  
 Kaj plumaro malrapide velkas  
 En la pluvo kaj la suna brilo.

Ĉiutage Hiavato iris  
 Tien por atendi kaj gardadi;  
 La supraĵon ofte li moligis,  
 Kaj forigis herbojn kaj insektojn,  
 Pelis for kun krioj kaj sarkasmoj  
 Kagagion, reĝo de la korvoj.

Fine el la tero saltis supren  
 Malgrandega plumo en aeron,  
 Kaj aliaj sekvis ĝin, kaj antaŭ  
 Ol finiĝis la somero, staris

La maiz' vestita per beleco;  
 La venteto blovis la vestaron  
 Kaj la longajn brile flavajn harojn.  
 Kaj entuziasme Hiavato  
 Kriis, "Tio estas Mondamino!  
 Jes, la homamiko, Mondamino!"

Poste alvokinte la avinon  
 Kaj Iagon la fanfaronulon,  
 Li al ili montris la maizon  
 Kreskadantan bele kaj fiere,  
 Diris pri baraktado kaj triumfo,  
 Pri la nova nutro donacita  
 Al la homoj, de la kara Dio.

Kaj post tio kiam la aŭtuno  
 Jam flavigis la vestaron verdan,  
 Kaj la kerno molaj kaj sukozaj  
 Malmoliĝis kiel perldisketoj;  
 Kolektinte la naturajn spikojn,  
 Detirinte la velkintajn ŝelojn  
 Kiel li antaŭe senvestigis  
 Mondamino post la baraktado,  
 Tiam li preparis por la gento  
 La festen' unuan da maizo,  
 Kie li al ili konatigis  
 La donacon de la Grandanimo.

Kariako: latine, *cariacus*; angle, *common american deer*; amerika cervo de la geno kariaka.

Vakcinio: latine, *vaccinium*; angle, *blueberry*.

Lagrizo: angle, *wild rice*; sovaĝa rizo.

Tipio: angle, *teepee*, *wigwam*; indiana loĝejo el stanga kadro kovrita per feloj kaj ŝeloj de arboj.

*Domestrino*—Brigeto, mi vidis hodiaŭ matene ke la laktisto vin kisas. De nun mi prenos la lakton.

*Brigeto*—Estos senutile, sinjorino, li ja promesis ke li neniam kisos iun escepte min.

## JAPANA KANTO DE FELIĈO

Molaj la ombroj  
 Surrampas la valon,  
 Lulante al dormo  
 Floreton kaj min.  
 Baldaŭ la Noktvent'  
 Kun spiro papava  
 Mantele surkovros  
 L'arbaron kaj nin.  
 Hela tagiĝo  
 Kiun Sundio kisis;  
 Ora noktigo—  
 Feliĉa la tag'.

Molaj la herboj  
 Sub ni fleksante;  
 Pli mola la Sudvent'  
 Libere vagante.  
 Dolĉaj la lipoj,  
 Floreto Ĉerizo;  
 Pli dolĉaj la brakoj  
 Al mi altenantaj.  
 Dormo, sorĉisto,  
 Tuŝas palpebrojn;  
 Korpo kaj cerbo  
 Cedas al pov'.

Sort', matene de l' vivo,  
 Nin ligis per ligoj  
 Kiel marŝaŭm' malpezaj;  
 Paroletis "Kismet";  
 Nin ligis per rozoj  
 Songfloraj petaloj  
 Torditaj, teksitaj  
 De l' amo en ret'.  
 Tiel Granduloj  
 Nin vokas en sonĝo,  
 Profunde Nirvanen  
 Post tago de l' viv'.

Verkita angle de  
 —G. W. J. Angell.



## EL TRANS LA MARO

*Ruslando.*—La organo oficiala de la Ruslanda Esperantista Societo, *Ruslanda Esperantisto*, aperas nun sub nova administracio. Kelkaj amerikanoj povas memori pri Sro. Postnikov, malnova samideano el Vladivostok, kiu du tri jaroj loĝis en Ameriko kaj fondis en Nov-Jorko ĵurnalon en rusa lingvo, nomita *Rusa Voĉo en Ameriko*. Li nun publikigas la ĵurnalon *Ruslanda Esperantisto*, kiu havas ilustraĵojn, fakon de literaturo kaj arto, ktp. La ĉefa redaktoro estas Sro. Vasilkovskij. Fortege kreskas la movado en Rusujo, kie ne eĉ unu Esperantisto lasis la kampon por senfina diskutado pri ŝanĝoj en la lingvo. Jen kelkaj notoj el *Ruslanda Esperantisto*: En la fino de 1089 jaro, en St. Peterburgo, laŭ iniciato de Sro. A. Postnikov, fondiĝis nova esperantista societo "Esperanto," kiu dum mallonga sia ekzistado, elmontris neordinare energian, bolantan kaj fruktodonan agadon. La membroj de suprenomita societo Sro. Postnikov kaj la redaktoro de "Narodnoje Blago" Sro. Vasilkovskij, por esplori la gradon de disvastiĝo de Esperanto en Rusujo kaj ankaŭ por ĝia aktiva propagando, traveturis la Volgajn urbojn, la tutan Nigrmaran bordon, estis eĉ en Kaŭkazo, kaj ĉe reveno Sro. Postnikov vizitis Jasnaja'n Poljano'n, kie granda rusa pensulo grafo L. N. Tolstoj, en interparolado kun Sro. Postnikov, denove jesigis sian ĉiaman kunsenton al propagando de Esperanto. Rezultato de tia vojaĝo estis la fondo de filioj de societo "Esperanto" en urboj Kostroma, Novorosijsk, Odesa, Rostov na Donu, Samara, Saratov, Aleksandropol, Simbirska, Sizranj, Jaroslavl, Staraja Rusa, Orjol, Irkutsk kaj Ekaterinburg. La 26-an Decembron de 1908 jaro en St. Peterburgo, en salono de Magistrato estis aranĝita koncerto-balo, en kiu partoprenis literaturaj kaj artistaj fortoj. Inter vizitantaro ĉeestis kelkaj altranguloj, ekinterestiĝintaj pri Esperanto kaj ĝia movado. Oni devas ankaŭ noti la paroladon pri Esperanto, diritan en Decembro de pasinta jaro en St. Peterburgo, en la Unua Tutrusa virina kongreso, kies komitato, proponinte sian salonon, petis organizi por siaj membroj la kursojn de Esperanto. La sama peto estis ricevita el

urbo Carskoje Selo, de la loka kleriga societo "Radio," kaj de multaj aliaj societoj. Post persona klopodado de Sro. Vasilkovskij la Rusa Ruĝa Kruco cirkulere la 4 februaron de kuranta jaro rekomendis al ĉiuj siaj oficejoj la Esperanton kaj ordonis liveri en la Ĉefan Administrejon la nomaron de personoj, kiuj deziros lerni tiun ĉi lingvon, por aranĝi al ili la specialajn kursojn. La signifa fakto de la lasta tempo estas efektiviĝinta jam unuigo de societoj "Espero" kaj, "Esperanto" en unu "Ruslanda Ligo Esperantista," kio, sendube, tre fruktodone rezonas en plua sukcesplena propagando de la lingvo Esperanto. Sro. V. Maynov instruas Esperanton en St. Peterburgo, en Instituto de Oldenburga Princo. La solida Moskva libredonejo "Posrednik" (Peranto), eldonanta prefere la verkojn de grafo L. Tolstoj, konfesante la grandegan mondan kaj klerigan signifon de Esperanto, komencis nun presi ankaŭ esperantajn librojn kaj jam eldonis du librojn de Dro. Kabanov: propagandan broŝuron kaj plenan lernolibron de Esperanto. Gazetaro: "Sizranskoje Ultro," "Samskij Golos," "Orlovskij Vjestnik," "Krimskij Vjestnik" kaj "Kazbek" jam formas en siaj redakciejoj la filiojn de "Ruslanda Ligo Esperantista." Aperanta en Peterburgo polica revuo "Vjestnik Policii" presis en siaj paĝoj, sub redaktado de V. Maynov, esper. gramatikon kaj esper.-rusan vortaron, ankaŭ artikolojn kaj notojn pri la lingvo Esperanto kaj ĝia movado. Ĉiamajn artikolojn pri Esperanto enhavas la peterburgaj ĵurnaloj: "Narodnoje Blago," kaj "Priroda i Ludi." En februaro de nuna jaro en Moskvo eliris unua numero de la esperanta gazeto "La ondo de esperanto."

*Algerujo.*—En la ĉefa urbo, Algero, okazis dum Aprilo la Oka Internacia Kongreso de Hidrologio, Klimatologio kaj Fizioterapio. Laŭ antaŭaj anoncoj, Esperanto estis oficiale uzita en tiu kunveno.

*Brazilujo.*—Esperantista montraĵo aranĝita en la nacia ekspozicio ricevis oran medalon, laŭ *Brazila Esperantisto*.

*Argentina Respubliko.*—Laŭ raporto presita

en *Brazila Esperantisto*, estas unu klaso por Esperanto en la publika lernejo de Buenos Ayres.

**Bulgarujo.**—Dum la somero estos Bulgara Kongreso Esperantista, por kiu petas sendi ĉiuspecajn esperantaĵojn al Sro. Ivan Nenkov, Tirnova, Bulgarujo.

**Bohemujo.**—Centra asocio de bohemiaj esperantistoj, Bohema Unio Esperantista, aranĝis la 14'an de Marto ĝeneralan kunvenon en sia sideja kafejo "Union" en Prahoo. El dudek ses kunligitaj societoj partoprenis per siaj deligitaj dek kvar. La ceteraj salutis la gravan kunvenon per telegramoj kaj leteroj. La B. U. E. kunigas nunpli ol mil bohemiajn esperantistojn. La kunveno decidis pri nacia bohema kongreso esperantista, kiu okazos dum la lastaj tagoj de Septembro, 1909. La laboro de la Unio estis organizita laŭ kelkaj diversaj sekcioj—organiza, propaganda, informa, ekspozicia, kongresa, ĵurnalista, konsula, redakcia, ekzamena kaj lingva. La kunveno protestis oficiale kontraŭ ĉiuj penoj "reformi" Esperanton, kaj kontraŭ ĉiu peno kunligi ĝin kun ia religia, politika aŭ sociala movado aŭ ideo. La adreso de la Unio estas Kafejo "Union," Praha I, 342.

**Britujo.**—Sin trovas en *The British Esperantist* multaj atestoj pri la fortiĝo de la movado kaj la intereso kiu instigas la klubojn. En Edinburgo la klubo havas kunvenojn dum la tuta somero, tiel granda estas la intereso pri la afero. En Dublin, 18'an de Marto, Dro. Jameson Johnston faris paroladon antaŭ granda aŭdantaro en Trinity Kolegio, pri "La Rilatoj inter Esperanto kaj la Scienco." La loka gazetaro komencas atenti pri la movado en Dublin. Nova klubo fondiĝis en Coleraine, Irlando. La Brita Esperanta Asocio ofte donas ateston pri sia konfido per eldono de novaj libroj.

**Francujo.**—Laŭ raportoj en ĉiuj esperantaj gazetoj de tiu lando la movado esperantista restas fortika kaj sana. En florbatalo en Nice esperantista ĉaro ricevis premion. Multaj artikoloj pri Esperanto aperas en ĵurnaloj. La Presa Esperantista Societo, kiu dum la lasta jaro donis ĉiujn siajn fortojn al batalo kontraŭ la "ildisma" movado kiu havis la celon detrui Esperanton per petolemaj ŝanĝoj, nun anoncas ke ĝi revenas al la tasko de la presado de la *Grand Dictionnaire Francais-Esperanto*, kiun ĝi eldonas en serio da folioj. Oni povas havi komprenon pri la grandeco de la vortaro vidante, ke sur la cent sesdeka granda paĝo la lasta vorto franca estas *boulenniere*. Ne sole la fakto ke ĝi reprenas tian grandegan taskon, sed ankaŭ ke ĝi elspezas por tiu grandan sumo da mono, pravas sen dubo ke la *Preso Esperantista Societo* estas konvinkita ke la idisma movado estas en **Francujo lastjara** afero. Sro. Luis Carlos, redaktoro de *Le Monde Esperantiste*, rue Rollin 7, V, Paris, fondas Internacian Ligon de la Esperantista Preslaboristaro. Presistoj povas ricevi de li

plenan informon. La jara kotizaĵo estas kvar frankoj.

**Germanujo.**—La Esperantisto Gruparo el Berlin eldonis libron *Esperanto und seine Feinde*, en kiu oni repuŝas la argumentojn de la "idistoj." Samtempe, la prezidanto de la grupo idista en Berlin eldonas broŝuron per kiu li celas krei novan "idon." Statistikoj pri la naskado de novaj "idoj" estas interesplena kiel familia historio de kuniktoj. Sajnas, la la idaro volas nin venki per la forto de superaj nombroj, ne da uzantoj, sed da apartaj lingvoj. . . . "Tutmonda Esperanto Anonkspedo" estas asocio nove kreita en Berlin por vastigi kaj fruktigi Esperanton kiel rimedo por anoncistoj.

**Holando.**—La nacia gazeto, *Holanda Pioniro*, raportas en sia aprila numero pri la bonstato de Esperanto en tiu lando. En holanda lingvo ĝi havas gravan artikolon de Sro. Baart de la Faille, kiu en la unua tempo akceptis "Idon" kiel pli bona lingvo ol Esperanto, sed nun returnas sin al Esperanto, konvinkite ne sole pri ĝiaj lingvaj superecoj, sed pri la nevenkebla unueco kiun ĝi havas, kaj kiun nenia lingvo senfundamenta povas havi.

**Hungarujo.**—En tiu lando okazos plej grava triumfo de Esperanto dum la venonta somero. La Internacia Medicina Kongreso ĉe Budapeŝt ricevos raportojn kaj permesos diskutadojn en Esperanto, kaj estos en la Kongreso speciala sekcio esperantista. Tiel ĝojige kreskas la afero ĉe la medicinistoj!

**Lingva Komitato.**—Laŭ raporto presita en *Svisa Espero*: La Esperantista Akademio ĵus eldonis la raporton de Prof. Th. Cart, direktoro de la sekcio por la Komuna Vortaro. Tiu raporto enhavas tabelon de ĉirkaŭ ok cent novaj radikvortoj kun kvinlingvaj tradukoj. Tiu tabelo estas nun submetata al la aprobo kaj kritiko de la Lingva Komitato kaj la vortoj akceptotaj estos aldonataj al nia *Universala Vortaro*. Oni vidas per tio, kiel malveraj kaj partiaj estas la asertoj de kelkaj reformistoj, kiuj pretendas ke nia Lingva Komitato tute ne laboras. Ĝi laboras malrapide, sed dea pli zorge ĉar ĝia laboro estas longedaŭra.

**Svisujo.**—La oficiala organo, *Svisa Espero*, raportas pri la fondo de kelkaj novaj kluboj kaj la aliĝo de multaj novaj anoj. La klubo de Neuchatel havas cent tridek kvar anojn. Venis al Genevo el Hindujo Fno. Selincourt, kiu reprezentas la hindujajn misiistojn en Barcelona. En la Komerca Asocio ĉe Morges Sro. Jayet instruis kvardek lernantojn. Sro. Thoney skribas el Lausanne: "Hieraŭ mi faris paroladon pri Esperanto al la poŝtofcistoj de Laŭsanne kaj havis belan sukceson. Je la fino de la parolado mi prepariĝis por respondi al la kontraŭuloj, sed anstataŭ kontraŭdiri, miaj aŭdantoj propramove petis ĉu mi bonvolus fari kurson kaj peti lokon al la Direkcio de la Poŝtofcicejo." La Svisa Esperantista Societo tenis kunvenon en Solothurn dum Aprilo, 24-25.

# P R E S S

When not otherwise stated, any book or magazine reviewed is sold by our book department

*Anatomia Vortaro.*—Every well-bred animal has a healthy repugnance for the dead of his own species, and a great deal of effort and training are necessary to overcome this in mankind. When it has been properly subdued we can then become cannibals or medical students, according to the individual inclination. Unlike the varying degrees of sensibility which are developed by climate or social custom with regard to the outer structure, leaving for eternal dispute the questions of propriety as to revelation or concealment of face or form, this repugnance is a radical, well-founded animal instinct, and its absence an indication of culture or depravity. We owe to this feeling a state of ignorance of anatomy and physiology which, could we compare ourselves with a really enlightened race of people, would be staggering. Any school-girl can go blindfolded to a map of the world and put her finger on the spot where Alexander stood and cried because there was no more territory to be invaded. Yet ask this same infant prodigy to put her finger on the *processus zygomaticus* and she will be quite unable to do so. Can you? No! Yet there it is, within an inch of your eye! Let us fool with planetary theories and theological hypotheses *after* we know more of our own structures.

"Know thyself; presume not God to scan—  
The proper study of mankind is man."

Of course, the proper study of mankind is everything, but he will succeed better in his other studies if he prefaces them with a wide popular knowledge of his own machinery and how to care for it. For the benefit of Esperantists who wish to talk about their insides, or perhaps apostrophize a case of earache in the international tongue, the *Anatomia Vortaro* will prove invaluable. It was prepared by the Medical Esperanto Group of Paris under the presidency of Prof. Ch. Bouchard, a member of the Paris Faculty of Medicine and of the Academy of Sciences. Among the collaborators were Drs. Briquet, Coze, Dardel, Deiterlin, Dor, Francken, Gambier, Hamon, Mendel, Mesnard, Noel, Roblot, Rodet, Sevnaeve and Vesoux. The book is printed in four parallel columns—Latin, French, English, Esperanto. Postpaid, 45 cents.

*Du Mil Novaj Vortoj.*—The student of Esperanto need not take fright at the title of this book. Most of the so-called new words have long been in use and the great majority are even found in the vocabulary of the "American Esperanto Book," compiled over two years ago. There is, however, a sufficient number of new roots to make the book a desirable addition

to any Esperanto library. It is compiled by Paul Boulet from the works of Dr. Zamenhof, and includes all words not found in the *Universala Vortaro*. Translations are given in seven languages—French, English, German, Spanish, Italian, Russian, Polish. Postpaid, 45 cents.

*La Simbolo.*—A small magazine of Esperanto, elegantly printed, and bearing many evidences of vital stamina. The very nature of propaganda work of any kind, ever since printing presses were invented, crops out in books, pamphlets and periodicals. History, otherwise identified as philosophy teaching by example, by no means proves that the first periodical born in a given cause is necessarily the best. The fact that AMERIKA ESPERANTISTA, of September 8, 1906, has attended funeral services over three later productions gives us no right at all to set up a sign "No Trespassing"—it constitutes at most a gentle hint. *La Simbolo* is a credit to the shop which prints it, being with the single exception of *Bela Mondo* the neatest Esperanto Magazine. It is obviously one of those "pet" periodicals of which type the *Philistine* by Elbert Hubbard is the leading exponent. It even has the brown cover with one of Hubbard's creeds on the back page. The publishers issue a companion magazine in English, called *The Symbol*. The price of *La Simbolo* is \$1.00, or with *The Symbol* a year, \$1.50. Published at Tacoma, Washington. Orders may be sent to American Esperantist Company. Not in this connection especially, but as to all subscribers except to those of *La Revuo*, we wish to remind our customers that we act only as forwarding agents and cannot be responsible for orders voided by cessation of publication.

*La Revuo.*—The April number contains a continuation of the story *Marta*, translated by Dr. Zamenhof from the original by Eliza Orzeszko; *L'Arbo de l'Espero*, by Grabowski; *Novelo*, a one-act drama (for two women and two men); *Portreto*, a one-act drama (for one woman and two men); *La Morto*, a short story; *Filozofiaj Pripensoj de Malsaĝa Kapo*, a monologue; a sketch of Pastro Peltier, who died February 17; books reviews and news notes. *La Revuo* is by all means the leading literary magazine of Esperanto, and contains some work by Dr. Zamenhof in each number. We have a large supply of all numbers to date for 1909, at 15 cents per copy, or \$1.60 for yearly subscription, mailed from this office.

*Tutmonda Jarlibro Esperantista.*—This book contains in its more than two hundred pages much valuable information, practically the en-

tire contents consisting of addresses of Esperanto societies and individual Esperantists. The accuracy of some of the information is, however, open to question, and its obvious incompleteness has caused the publishers to announce that the 1909 edition will be the last. This will be issued some time during the present year. The plan for each national society to issue its own year-book or directory promises that the information thus afforded will be much more accurate and complete. The 1908 *Jarlibro*, postpaid, 60 cents.

*T. E. K. A. Jarlibro.*—This is the first year-book of the World Society of Esperantist Physicians, printed less than five months after beginning organization. It contains a brief account of the work of organization to date, a list of four hundred and twenty-five members, an article on medical terminology, rules of the society, table of exchange, and advertisements. It can be obtained for 20 cents in paper, 30 cents cloth, from the publisher, H. F. Adolf Thalwitzer, Koetzchenbroda-Dresden, Germany. (Our readers may know that two cents now carries a letter to Germany, and that international coupons, value five cents, may be had for six cents each at the larger post offices). Every physician who reads Esperanto is urgently requested to send his address to the American Consul of the *Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio*, Dr. Kenneth W. Millican, Hotel Mentone, Chicago.

*La Faraono.*—Because of the extraordinary demand for this book we have ordered a special quantity of Volume I, which will be sent postpaid for seventy cents. It is as vain to say what is the "best" book as to say who was the "greatest" man. Few books of fiction there are, in any language, superior to *La Faraono*. It renders wofully absurd the statements of critics or doubters that Esperanto is not a living language.

*Brazilio.*—In Paris last December Sro. Everardo Backheuser, president of the Brazilian Esperanto League, gave a lecture on "Brazil" before the Geographical Society of Paris. Several eminent Esperantists were present, the speaker being presented by Prof. Bourlet. Sro. Gabriel de Piza, Brazilian minister to France, presided. The lecture given by Prof. Backheuser, the introductory remarks by Prof. Bourlet and a short speech by Sro. Gabriel de Piza, with portraits and a few illustrations, have been published in a book of twenty-six pages. Price, 35 cents.  
AMERIKA ESPERANTISTO, Chicago."

*Esperanto Flag.*—Green felt, for wall decoration (star mounted on one side only), 25x38

inches in size. A fine "trophy" for the Esperantist's library or den. Made for American Esperantist Company. Postpaid, \$2.00.

*Esperanto Button.*—Of white celluloid, bearing green star and words *Esperanto—Lingvo Internacia*. Mounted with pin only. A single button by mail, ten cents; five or more, five cents each.

#### KOREKTANTA KORESPONDADA KLUBO

Tiuj kiuj deziras korespondi esperante aŭ skribi anglan leteron kaj recevi aŭ japanan aŭ germanan aŭ alilingvan respondon devas fariĝi ano de la K. K. Klubo, sendante al la jenan adreson: *Sro. W. Stokes Hall, K. K. K. I., Care Dr. J. C. O'Connor, Esperanto House, 17 St. Stephen's Square, Bayswater, London, W., England.*

#### REGULABO.

1. La nomo de la Klubo estas K. K. K. (Korektanta Korespondanta Klubo).
  2. Ĉiu ano estas devigata respondi korespondadon, en Zamenhofa lingvo, de alia ano sciigante kiajn erarojn li trovis, laŭ sia opinio, en la ricevita letero.
  3. Ĉiu ano ricevos, je la tempo de sia aliĝo, kaj kvarfoje dum la jaro, la adresaron. Li ankaŭ povos ricevi pluan kopion sendinte poŝtmarkon al K. K. K. I.
  4. Ĉiu ano havos numeron kaj subskribos kun nomo kaj numero.
  5. La jara kotizaĵo estas 50 Sd. (unu ŝilingo) t. e. 5 internaciaj poŝtkuponoj aŭ brita P. O. de britaj koloniuloj.
  6. Oni povas nomi sian profesion, kaj unu temon, kaj devas diri ĉu li korespondos letere aŭ karte.
  7. Plendojn pro ne-respondoj, aŭ pro respondo en alia artefarita lingvo ol la Zamenhofa, oni sendos al K. K. K. I. Post 3 plendoj kulpulo estos eksmembrita.
- Tial ke la kotizaĵo estas tre malalta la Sekretario estas devigata por daŭrigi la Klubon tute forlasi sian propran korespondadon. Tamen se esperanta komencanto sendos lin respondkuponon li tuj ricevos respondon.  
Ne estas certe ke oni havos neesperantajn korespondantojn.

J. C. Cooper, secretary of the Promotion League of McMinnville, Oregon (see advertisement), has issued a post card entirely in Esperanto. It is ornamented with a life-size picture of an English walnut grown near the city, and a somewhat reduced portrait of the county court house. In sending the card to a non-Esperantist, he adds by rubber stamp: "For key to read this card send two cents to





STRICTLY CONFIDENTIAL

BARCELONA NUMBER

AMERIKA ESPERANTISTO will have a special representative in Barcelona and will publish a good report of the congress, in both Esperanto and English. With illustrations. All Europe concedes that the Sixth congress is to be held in America, therefore a careful report of the Fifth will be especially desirable in getting before our Esperantists an adequate sketch of what is to be expected of them, and still more desirable in showing the non-Esperantists what is to happen in America in 1910. To make this special number what it should be will require the expenditure of three or four times the cost of a regular issue. We are ready to do the work, but other Esperantists must provide the fund, as our policy from the first has involved spending for propaganda and advertising every dollar as soon as received, and often before. You are cordially invited, at least—yes, you are emphatically urged—to place your order for extra copies of the Barcelona Congress Number, at five cents per copy, *now*. Do not remit unless you care to, but *order now*. Give us the order now for extras of the Chautauqua Congress number, too—especially those of you whose late orders could not be filled last year! In order that the Barcelona Number may be used to the best advantage, and no two lists “repeated,” we shall publish a statement of advance orders and their proposed use.

ADVANCE ORDERS

*Magazine and Newspaper Editors:*  
 American Esperantist Company (General) .....1200  
 Mrs. E. A. Baker (Missouri Newspapers) 500

*Ministers and Educators:*  
 Prof. Benedict Papot, Chicago public school teachers (partial list) ..... 800  
 Arthur Baker, Chicago ministers ..... 400

*Members of Legislatures:*  
 Dr. Taylor, Paris, Texas ..... 100

*University and College Libraries:*  
 Ivy Kellerman, A. M., Ph. D. .... 50

*Public Libraries:*  
 ? ? ? ? ? .....????

*Women's Clubs:*  
 ? ? ? ? ? .....????

*Commercial Schools:*  
 E. C. Reed, Chicago ..... 100

*Physicians and Surgeons:*  
 Dr. K. W. Millican, Chicago ..... 50

*For Personal Distribution:*  
 J. D. Hailman, Pittsburgh ..... 20  
 Dr. C. H. Fessenden, Newton Centre, Mass. .... 20

*College Presidents:*  
 ? ? ? ? ? .....????

*Town School Principals:*  
 L. M. Fisher, Chicago ..... 200

To illustrate the immensity of the task of securing adequate publicity, take notice that the 1,200 copies to be sent to periodicals will cover only the literary and news press of circulations 5,000 and over. It does not include the religious, commercial, farm, trades union or fraternal periodicals, of which there are many with enormous circulations, or the local press, which makes the total 22,000 for United States and Canada.

Prof. Papot's generous subscription for Chicago teachers covers only *one-fifth* of the list. There are three thousand physicians and surgeons listed in the telephone directory of Chicago—Dr. Millican's subscription covers *one-sixtieth* of the list.

Commercial schools—there are myriads of them. College presidents—it is a *shame, shame, shame* that we have hitherto been unable to mail our literature to them. We *must* get them this Barcelona Number!

Town and Village School Principals—does *anybody* love these people well

enough to send a few of the 30,000 of them a copy of this magazine?

Only as you order this number in *advance*, and in large quantities, will we be able to give it the necessary attention, work and money. We want to bombard the whole United States and Canada with this number, and produce a great awakening, preliminary to giving Europe the surprise of its life when it comes to attend the Sixth Congress.

Please remit for orders under \$1.00. Larger orders subject to payment after publication, if desired. We shall be satisfied with nothing less than 50,000 circulation for this number.

Order *now* and give the force of your example to help others who may be hesitating.

---

#### "KNEE-DEEP IN JUNE"

To a poet whose specialty is hitting off the joys of country life, June is the month of inspiration, and standing "Knee-Deep in June" and splashing the perfumes is a delightful pastime. Very nice indeed for a poet who owns two sections of Indiana farm land, or for a pair of robins come north on their wedding tour and staying in the most exclusive cherry trees at nothing at all per day for expenses. But during June (and July) there are about twenty thousand small publishers wondering just why those two months have been left in the calendar. Leaving the other 19,999 to their own devices, I want to say a few things to you Esperantists about AMERIKA ESPERANTISTO.

Under normal conditions, the receipts of a small publishing house for June and July are about sixty per cent less than for average months throughout the year. Fixed expenses, such as rent, salaries, postage, printing—in fact every large item except advertising—remain practically unchanged. There is nothing new about this. Esperanto, however, presents peculiar conditions to at least one publisher this year. In order to properly serve our thousands of readers and the propaganda of the Esperanto cause I must leave Chicago August 7th for Chau-

tauqua and go from there to Barcelona, spending two months away from home. On the first week of August a little publishing business feels as though it had been sick abed for sixty days—and it has! If AMERIKA ESPERANTISTO is still too weak to sit up when August comes, I'll have to stay at home and feed it with a spoon.

This is a matter which concerns us all. I want to give you people a first-hand report of that Barcelona congress, and for the next two months will wear old clothes, patronize a little restaurant I know on the west side of Cottage Grove Avenue and turn a deaf ear to the posters advertising the amusement parks and baseball games. But those economies will be necessary in any event, and unless you piece them out with special attention I shall be four thousand miles away from Barcelona on the fifth of next September.

What can you do?

You can help us fight off the usual lethargy of June and July.

How?

By thinking over your mental list of Esperanto books you are going to order, some time, the gifts of subscriptions you are going to make, some time, and doing it *now*.

If you can, buy a handful of subscription cards (75c each in lots of five or more) which are redeemable with premium book and yearly subscription at any time.

---

#### DO YOU WANT THESE?

The February number contained our review of the case between Esperanto and the attempt of the European committee of outsiders to change the language, in an article on "The Complications of Simplicity." It was our first attempt to treat the matter seriously, and probably the last. The so-called "Ido" movement is falling to pieces so rapidly in Europe as to merit no further attention. We have five hundred copies left of the February number, and if any Esperantist cares to use them or any number of them we shall be glad to sell them at one cent per copy, express or postage paid.